JARO I MAJO 1909 Nro 2

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA

INTERNACIA ASOCIO DE INSTRUISTOJ

LA ENHAVO: A. Ferrière-Eggleton: La novaj lernejoj. — J. Krumpholc: J. A. Comenius pri la lingvo universala. — P. Zoffmann: La instruisto en Danujo. — R. M. Popovič: La instruistoj en Montenegrujo. — Nils Ökland: La popolaj lernejoj en la norvegaj vilaĝoj. — P. Benoit: La instruistaj »Amikaroj« en Francujo. — G. R. Mills: La III-a kongreso pri la desegnado en London. — G. Becker: Rimedo por veki amon por la naturo. — Alessandro Mazzolini: Internacia kurso de lerneja manlaboro. — R. Frenkel: Internacia krestomatio. — La statistika paĝo. — Notoj kaj informoj. — Nia »telefono«: M. J. Wessel el Nederlando al la redaktoro, F. Durieux el Francujo pri Esperanto en la lernejo, Th. Čejka el Moravio al danaj gekolegoj. — I. A. I. — Korespondа fako de I. A. I. — Adresaro por instruistoj. — Adresaro por junuloj.

---

**Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.)**: Honora prezidanto: Dro E. Boirac, rektoro de la universitato, Dijon (Francujo). — Prezidanto: Th. Cart, profesoro de la franca universitato en Paris. — Vicprezidantoj: F. Maréchal, profesoro en Leeds (Anglujo), frl. C. de Chalmot en Koeln (Germanujo), R. Frenkel, inspektoro de gimnazio en Enisejsk (Siberio). — Sekretario: F. Durieux, direktoro de lernejo en Lille (Francujo). — Kasisto: Th. Čejka, instruisto en Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).

Membra kotizaĵo por 1 jaro 1 Sm (= 2·5 Fr. = 2·40 K = 2 sh = 2 Mk = 1/2 dol. = 1 Rb = 2·50 peset.) estu sendata per poŝta mandato aŭ per 10 poŝtaj »respond-kuponoj« (kun la poŝta stampaĵo!) al la kasisto. — **Membroj de I. A. I. ricevas la oficialan organon senpage.**

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

REDAKCIO: *Th. Čejka*, Bystřice-Hostýn, Moravio (Aŭstrio).
ĈEFAJ KUNLABORANTOJ: *J. W. Eggleton, R. Frenkel.*

**KONSTANTAJ KORESPONDANTOJ.**

**Anglujo**: Prof. Maréchal, G. R. Mills. — **Aŭstrio**: Prof. R. Fridrich, J. Krumpholc. — **Belgujo**: F. Verbanck. — **Danujo**: N. Moesgaard, P. Zoffmann. — **Finnlando**: Emil Elenius, Samppa Luoma. — **Francujo**: F. Durieux, A. Germaine. — **Galicio**: J. Kaszycki. — **Germanujo**: Prof. H. Gartelmann, K. Schönherr. — **Hispanujo**: Jos. Albagés, Antonio López y Villanueva, prof. de normala lernejo. — **Italujo**: Prof. Alessandro Mazzolini. — **Japanujo**: Kiuichi Nohara. — **Montenegrujo**: Risto M. Popovič-Čupič. — **Moravio**: J. Holub, J. Grňa. — **Nederlando**: Dreves Uitterdijk, M. J. Wessel. — **Norvegujo**: Nils Økland. — **Polujo**: B. Głuchowski, Fr. Solarski. — **Portugalujo**: G. M. Sarmento, prof. de normala lernejo. — **Rumanujo**: M. Timuŝ. — **Rusujo**: M. Beregavskij, Vlaso Kuročkin, inspektoro. — **Serbujo**: Jov. P. Jovanovič. — **Skotlando**: Ch. T. Macgregor, Thomas A. Maxwell. — **Svedujo**: J. Hammarlund, E. G. Risberg. — **Svisujo**: E. Ducommun, G. Stroele, G. Grossenbacher. — **Turkujo (Azia)**: J. Guéron.

---

**Redakcio kaj administracio** de la I. P. R. troviĝas en *Bystřice-Hostýn, Moravio, Aŭstrio.* — Jara abono por nemembroj la I. A. I. = 1·5 Sm. Oni pagu per poŝta mandato aŭ per 10 poŝtaj »respond-kuponoj« (kun la poŝta stampaĵo!). — Poŝtaj markoj *ne estas* akceptataj por la pago de l' abono aŭ membra kotizaĵo.

---

**Leterfako de la redakcio.** Ni dankas al multaj kolegoj kaj ankaŭ nekolegoj, kiuj esprimis al ni sincerajn gratulojn kiel pri la interno tiel pri la ekstero de nia 1-a kajero. Tiom da laŭdoj ni certe ne meritas! Nu, ili almenaŭ kuraĝigos nin labori ankoraŭ pli bone. — Al tiuj, kiuj sendis al ni adresojn de personoj, kiuj povus aliĝi al I. A. I. aŭ aboni I. P. R., ni sendas apartan dankon, ĉar ili multe helpis nian aferon. Amikoj, ne forgesu nin ankaŭ estonte! — Ni estos tre dankaj al niaj legantoj, se ili **ĉiuj** kunlaboros iamanire en nia Revuo. Ĉiu ja povas de tempo al tempo sendi al ni interesajn sciigojn aŭ raportojn, kiuj tuŝas nian programon. — Tradukadu por la Revuo ĉion el viaj naciaj gazetoj pedagogiaj, pri kio vi pensas, ke ĝi povas interesi ankaŭ alinaciajn kolegojn. Preferu skribi viajn tradukojn nur resume, ĉar tiel nia gazeto povos alporti pli multe da interesa materialo. Por la preso skribu nur sur 1 paĝo de paperfolio kaj ne forgesu fari sufiĉan marĝenon por eblaj rimarkoj de la redaktoro. — **Atentigu** viajn eldonistojn de literaturo pedagogia pri nia Revuo kaj igu ilin sendadi al nia redakcio regule po 2 ekz. de ĉiuj eldonaĵoj (en kiu ajn lingvo), kiuj povas iel utili al instruistoj. Ni donos volonte recenziojn pri tiuj libroj (per helpo de niaj »konstantaj korespondantoj«). — Kiu havas proponojn, koncerne la

**B. Głuchowski**
**Raków**

# La novaj lernejoj.

De *A. Ferrière,** Genève (Svisujo).

De kelka tempo oni multe parolas pri la „novaj lernejoj“: parolas unuj por laŭdi ilin, aliaj por kritikaĉi. La laŭdantoj vidas en ili la lernejojn de la estonteco, difinitajn por regeneracii la nuntempan junularon. La malfavoraj kritikantoj kontraŭcertigas, ke la grava rolo, kiun oni donas en ĉi tiuj lernejoj al korpaj laboroj, malprofite influas sur la prisciencan instruadon, kaj ke la hodiaŭa epoko pli urĝe bezonas klerulojn, ol tiujn „multeflankulojn“ kaj „harmonie modelitajn“ karakterojn, pri kiuj revis Platono.

Kion, ĝustedire, signifas la termino: „nova lernejo“? Kiajn konstateblajn rezultatojn oni ĝis nun atingis per la „nova“ eduk-maniero?

Ĉi tiu movado naskiĝis en Anglujo antaŭ dudek jaroj proksimume. Dum longa tempo la lernejo Abbotsholme de Dro Reddie restis la sola „new school“ (nova lernejo). Poste, ŝatinda nombro da tiaj institutoj stariĝis en Anglujo, en Germanujo, en Francujo, en Svisujo. Plej ofte ili kreiĝas laŭ maniero interdevena, t. e. la plej ĵusajn fondas ordinare iu pedagogo, kiu antaŭe instruadis dum kelkaj jaroj en „nova lernejo“ jam ekzistanta. Ĉi tiu farmaniero estas ja plej aprobinda, ĉar preskaŭ neeble estas, imiti tiun edukan metodon; oni devas mem spiri tiun moralan eduk-atmosferon, por ensorbi ĝian tutan vivforton.

La esencan karakteron de l'novaj lernejoj montras ilia nomo germana: Landerziehungsheim, plej bone tradukebla laŭjene: kampara edukada hejmo. Oni do celas krei malgrandan socian organismon, kiu kiel eble similas familion kaj kuŝas plene sur la kamparo.

Por doni karakteron familian, oni zorgas grupigi la instruatojn en apartajn domojn, kie ili loĝas kune kun kelke da edziĝintaj profesoroj. En eduka rilato, treege valoras por la junularo la apudestado de virinoj kaj infanetoj. Bonege efikas ankaŭ la kamparo. Ne sole ĝi ebligas sindonadon al multaj interesplenaj observoj kaj al sanigaj terkulturaj laboroj, sed ankaŭ (kaj tio ne estas la malplej grava konsidero) ĝi influas bonfare per sia trankvilo, per

* S-o *A. Ferrière* estis antaŭe profesoro en unu el tiuj »Novaj lernejoj« kaj sekve li konas ĝisfunde la tiean sistemon. *Rim. de la red.*

la klareco de siaj horizontoj, per la silento de siaj arbaroj. Ĉio ĉi invitas al serioza meditado kaj permesas al la animo superi la mil neniaĵojn, kiuj plenigas aliloke la ĉiutagan vivadon.

La plej grava riproĉo, kiun oni faras al la novaj lernejoj, estas, ke ili estas internulejoj: „Krei mezon familian, – tre bone! – sed la vera familio valoras milfoje pli multe.“ Tio estas vera, sed ĉu ĉiu familio taŭgas por plenumi sian taskon? Ĉu por vivo intensa ĝi elformas junulon tiel bone, kiel internulejo? Plie, oni ne forgesu jenon: por ke la edukado estu harmonia, ĝuste proporciita, la novlernejano devas vivi kvazaŭ en edukada elemento, kvazaŭ ĉirkaŭita, envolvita, per edukada aero! Kaj vere tiu atmosfero tute ne kunportas la gravajn malòportunaĵojn, kiujn ni, vole-nevole, kunigas kun la vorto: internulejo. Cetere, longaj libertempoj kaj, kelkokaze, sabat-ĝis-lundaj ekskursoj ebligas laŭbezone kontakton kun la familio.

Jen ankoraŭ tri trajtoj, kiuj diferencigas la novajn lernejojn, aŭ almenaŭ la plej multajn el ili, de la ordinaraj institutoj privataj aŭ publikaj. Unue: la instruado limiĝas je la antaŭtagmezaj horoj kaj fariĝas laŭ metodoj bazitaj sur plej novaj eltrovoj psikologiaj. Tiel la progresoj estas pli rapidaj, kaj oni atingas ilin per malpli da peno, aŭ almenaŭ sen neutila klopodo. Due: oni serioze okupiĝas pri ĉiuspecaj manlaboroj, – terkulturado, ĝardenado, ĉarpentado, forĝado. Tiaj instrufakoj havas tre grandan influon sur la karakteron. Ili instruas memregadon, energion, trankvilon, donante samtempe forton muskolan, korpan bonsanon kaj, fine, manan lertecon, kiu povas trovi sian utilecon en la vivo.

La tria diferenciga karakterizaĵo de la novaj lernejoj estas la tute speciala edukado morala kaj religia, kiun ricevas la infano. Oni povus ĝin nomi morala edukado per la libereco kaj la respondeco. Ĉi tiu interesa kaj originala flanko de la laboro de l' novaj lernejoj estas plejaltagrade realigita de la granda pedagogo germana Dro Lietz. Ĝi estas esprimebla per tri vortoj, kiujn oni povas konsideri kiel lian devizon kaj kiuj bone resumas lian tutan aktivecon: „Liebe ist Kraft“ (amo estas forto). Kaj vere, ne ekzistas forto pli alta.

Mallonge skizita, jen la portreto de tiu Dro Lietz, fondinto de la novaj lernejoj: homo pezeca, masiva, muskola, forta; vizaĝo kamparana, kun akcentegaj trajtoj, el kiuj brilas rigardo nemezureble bonvola. Li estas filo de gebienuloj Rugen'aj; sian infanecon li travivis meze de l' kampaj bestoj, kontraŭ la senlima oceano. En la aĝo de dekdu jaroj oni metis lin en la lernejon de Stralsund, sed lia karaktero ne konformiĝis al la vivo en fermita inter-

nulejo. Li frakasis ĉion. Liaj instruantoj, kiujn li turmentadis, ne havis por li ian alian senton, ol malestimon. Oni sendis al Stralsund lian pliaĝan fratinon, kiu devis lin eduki; kaj tiel li povis viziti la lernejon kiel eksterulo. Malgraŭ la opinio de la lernejestroj, tiu malgrandulo, plenega de energio, antaŭdestiniĝis trabati al si karieron. Dekkvin jarojn poste ni trovas lin doktoro de filozofio kaj licenciato de teologio. Li plenumis ĉi tiujn ambaŭ ekzamenojn en la daŭro de l' samaj ses monatoj. Dum unu jaro li instruadis en la New School de Abbotsholme (Anglujo), kaj en 1898 — li tiam havis nur 30 jarojn — li fondis sian unuan lernejon ĉe Ilsenburg en la Harz'a distrikto. Tri jarojn poste li malfermis sian duan lernejon sur la vasta kamparbieno de Haŭbinda en Turingio. Pasis ankoraŭ tri jaroj, kaj jen la malnova episkopa biendomo de Bieberstein apud Fulda ekviviĝis kvazaŭ abelujo: ĉi tio estis la tria „hejmo eduka" de Dro Lietz. La lernantoj transiras el unu lernejo en alian. La ok- ĝis dekdujaraj estas en la unua; ĝardenado kaj ludoj estas por tiuj ĉi la ĉefaj okupiĝoj. La dektri- ĝis deksesjaraj faras en Haŭbinda, laŭ pli vasta skalo, ter- kaj manlaboradon. Fine, la junuloj deksep- ĝis dudekjaraj studadas en Bieberstein prepare por siaj ekzamenoj. Sed ĉe ĉiuj tri lernejoj la programo estas la sama: instruado matene, ludoj kaj manlaboroj posttagmeze, lernekzercoj personaj aŭ studado antaŭvespermanĝe; ĉiuvespere muziko, teatraj prezentadoj, debatado, luktado ktp.

Mi nun diru, finante, kelke da vortoj pri la edukado morala kaj religia en ĉi tiuj lernejoj. Jen do tio, en kio ĝi konsistas. Ĉefe kaj super ĉio: ne ekzistas tie ia instruado pridogma. En la klaso oni traktas la religion el vidpunkto historia, kaj ĉiusektaj infanoj sekvas la instruadon. La unuan lokon okupas kompreneble la religioj hebrea kaj kristana. Sed la pliaĝaj lernantoj sekvas kurson de prireligia historio, — kurson altgrade taŭgan por inspiri toleremon kaj valorigi la moralan noblecon de l' kristanismo, almenaŭ tia, kiel prezentas ĝin la Evangelioj.

Oni ne faras, ĉe Dro Lietz, kurson de moralo, ĉar, por lerni la moralon, oni devas ĝin vivi. Tamen, se agado morala estas esence kaj ekskluzive praktika, oni povas kaj devas konigi al la infano moralan idealon. Tiucele Dro Lietz donas ĉiuvespere al siaj lernantoj la tiel nomatan Kapelle (kapelon). Ĝustedire, ĉi tio ne estas kulto. Kvankam ĝi komenciĝas kaj finiĝas per himno ope kantata, kaj kvankam mallonga preĝo antaŭiras la finan kanton, la Kapelle enhavas legadon de ĉiuspecaj verkoj taŭgaj por veki ĉe la infano la senton de l' bono. Estas jen romanoj, jen paroladoj

de Bismarck, jen maksimoj de Epikteto, leteroj de Hilty, noveloj de Rosegger, eĉ gazetaj artikoloj aparte signifaj.

Dro Lietz amas fari, dimanĉon vespere, sur iu najbara monteto, improvizan paroladeton, traktante jen ian ajn temon, pri kiu oni jam legis dum la pasinta semajno, jen la tiutagan feston religian aŭ patriotan, jen iun okazaĵon en la vivo lerneja. Elirante el la buŝo de tiu pastro de la infanaro, kiel ĉio tio estas simpla kaj altinspira! Kaj tamen ĝi estas nur malsuperega parto de lia influo. Laŭnature silentema, Dro Lietz agas precipe per sia ekzemplo kaj per kelkaj oportunaj vortoj. Sed estas ĝuste tiuj kelkaj vortoj, kiuj estas admirindaj, ĉar ili apogiĝas sur la malnova diro de Rousseau, ke infano en bonaj ĉirkaŭaĵoj estas mem nature bona. Li diras al la infano: „Vi estas libera homo“, kaj li traktas ĝin tian. Ĉe li — nenia spionado, nenia kontrolado! „Ĉi tie“, diras li, „oni ne eldonas ordonojn; ĉio devas fariĝi kutimo.“

Kaj kio rezultas? Eble la novevenintoj trouzas kelkefoje sian liberecon. kvazaŭ por disstreĉi siajn papiliajn flugilojn tro longatempe falditajn. Sed, submetitaj per la publika opinio de siaj samlernejanoj sub la ordon ĝeneralan, ili neniam ofendas ĝin plu. Esceptinte kelke da malvirtemaj naturoj — (bedaŭrinde ĉie troveblaj!) — neniam mi vidis junulon, pasigintan ĉe Dro Lietz kvar aŭ kvin jarojn, kiu ne fariĝis poste, kion Spencer nomus „belega specimeno de l' homaro,“ tio estas, individuo sana, forta, honesta, kuraĝa, vireca en la plej alta senco de l' vorto, fervora probatalanto de ĉio bona kaj bela.

El lingvo franca tradukis

Prof. *J. W. Eggleton* (Haŭbinda, Germanujo).

# J. A. Comenius pri la lingvo universala.

Originale verkita de *Josef Krumphoic*, Bystřice-Hostýn (Moravio).

(Daŭrigo 1.)

Unuaj postesignoj de pripensado pri artefarota lingvo universala troviĝas ĉe Comenius en lia korespondaĵo kun la franca scienculo M. Mersenne, kiu jam la 22. XI. 1640 skribis al Comenius pri universala alfabeto de sia samlandano Le Maire kaj pri sia nova lingvo universala.[9]

Kvankam mi ne konas respondleterojn de Comenius al Mersenne, mi tamen ne dubas, ke Comenius jam tiam, aŭ almenaŭ de tiu tempo, okupis sin per la ideo de artefarota lingvo universala. Ja Comenius jam en la sekvantaj jaroj 1641—42, dum

[9] A. Patera: *J. A. Komenského Korrespondence* 31, XXIX. (Praha, 1892).

sia dekmonata loĝado en London — do en la tempo de sia gloro la plej granda! — skribas multe, plej multe kaj originale pri tiu ĉi temo en sia plej perfekta verko filozofia „*Via lucis*“ (Vojo de lumo), en kiu li alie kaj pli detale ol en siaj antaŭaj verkoj pansofiaj priskribas siajn ideojn pansofiajn, konfesante ankaŭ la bezonon de nova lingvo universala. Comenius konsilas tie, ke oni transdonu la zorgon pri pansofio kaj pri plibonigo de malbonigitaj aferoj de tiu ĉi mondo al multaj viroj instruitaj el ĉiuj nacioj, por ke ili estu korporacio internacia, spirita unuiĝo de ĉiuj nacioj de la tuta homaro. Centro de tiu ĉi korporacio estu en Anglujo, kaj en ĉiu nacio estu krom tio pli malvasta korporacio de instruituloj, kaj ili ĉiuj intertraktadu kaj korespondadu reciproke per la nova lingvo universala, kiun oni, kompreneble, devus nur krei, ĉar la lingvo latina jam tiam ne sufiĉis por la bezono kaj pligrandigitaj postuloj de l' tempo.

Kaj al tiu ĉi nova, artefarota lingvo universala Comenius dediĉis el 22 ĉapitroj de „*Via lucis*“ ne sole la tutan ĉapitron XIX-an, sed ankaŭ ne unu paragrafon nome de la ĉapitroj XV, XX kaj XXI-a, eĉ la § 9-an de la dediĉo.

Post „*Via lucis*“ Comenius tuŝas la ideon pri nova lingvo universala ankaŭ en la plano kaj provo de siaj laboroj pansofiaj, en la verko „*Pansophiae Diatyposis*“ el la j. 1642—43, kiel ankaŭ en sia fama enkonduko al studo de lingvo latina, en la libro „*Methodus linguarum novissima*“ (La plej nova metodo de lingvoj) el la j. 1645—46, kie Comenius en la ĉapitro VI-a denove konfesas la ideon kaj utilecon de unu lingvo universala kaj sole pro manko de tia lingvo, sekve provizore, la taskon de lingvo universala lasas al la lingvo latina. La sekvantan jaron – 12. VI. 1647 — li skribas al sia amiko, angla germano S. Hartlib: »Via penado pri universala skribo de ĉiuj nacioj kaj lingvoj tre ekinteresis min, kvankam mi ne atendas de ĝi tiom, kiom mi dezirus. Milfoje estus pli bone havi lingvon novan . . .“[10]

En la jaro 1656, dum la brulego de urbo Lissa, forbrulis al Comenius la plimulto de manuskriptoj kaj biblioteko, tiel ke precipe el la verkoj pansofiaj restis al li ne multe, pro kio ne restis al li — al la maljunulo 64-jara — ol komenci denove.

Kaj tiel Comenius en sia nova, lasta loĝejo, en Amsterdam (1656—70), revenas ankaŭ al siaj laboroj pansofiaj kaj sekve ankaŭ al sia ideo de artefarota lingvo universala. Atestas tion ne nur la sciigo de S. Hartlib al L. Boyle (7. I. 1657), ke Co-

[10] A. Patera: *J. A. Komenského Korrespondence* 133, CXI.

menius sendis al Dalgarno sian ideon pri filozofia karaktero de lingvoj,[11] sed precipe ambaŭ volumoj de lia plej nobla kaj ĉefa verko pansofia „*De rerum humanarum emendatione consultatio catholica*" (Konsiliĝo ĝenerala pri plibonigo de aferoj homaraj) en kiuj du volumoj — „*Panegersia*" kaj „*Panaugia*" — eldonitaj en la j. 1666, Comenius ofte tuŝas sian ideon lingvan, precipe parolante pri „*Panglottia*",[12] la kvina parto de tiu granda sepvoluma sia ĉefverko pansofia.

Bedaŭrinde oni ĝis nun ne scias, ĉu kaj kie estas tiu ĉi „*Panglottia*", ĉar la propra restaĵo de Comenius ĝis nun ne estas trovita.

Ke Comenius konstante, do ankaŭ post la eldono de „*Panegersia*" kaj „*Panaugia*" kolektis kaj ordigis la materialon por ceteraj kvin volumoj de sia „konsiliĝo", tion verŝajne pruvas du manuskriptoj en la Brita muzeo en London sub la Nro 4254: kopio de plano pri pansofio de Comenius sub la nomo „*Centum dialogi Pansophiae*", kaj la detala plano de la VI-a volumo, nomota „*Panorthosia*", en kiuj Comenius rememoras krom „panglottio" ankaŭ la lingvon „catholican" – universalan.[13] Plue atestas tion verŝajne ankaŭ tio, ke la lasta aŭ antaŭlasta verko de Comenius „*Spicilegium didacticum*" (Spikaro didaktika) enhavas ankaŭ la ĉefajn principojn por la volumo IV-a „*Pampaedia*"; sed plej grave pruvas tion la fakto, ke Comenius post la eldono de unuaj du volumoj de „konsiliĝo" vivis, t. e. laboris ankoraŭ 4 jarojn, kaj la letero de postmorta ordiganto kaj eldonanto de liaj verkoj K. V. Nigrin al G. Vetter el la 13. VI. 1678, ke „*Pampaedia*" estas kaj „*Panglottia*" estos finitaj jam tiun ĉi semajnon.[14]

Sed oni ĝis nun ne scias kie estas tiu „*Panglottia*", kies celo estis ankaŭ serĉi, kiel oni povus krei novan universalan lingvon artan, kiel mi jam diris, kaj sekve ankaŭ mi ne povas diri, ĝis kien Comenius en sia ideo pri la nova lingvo universala fine alvenis.

Ke la volumoj III-a ĝis VI-a, kaj sekve ankaŭ eble la „*Panglottia*" – volumo V-a – ne restis tiel fragmentaj kiel la *lasta* (VII-a) volumo „*Pannuthesia*", trovita de Dro Kvačala en Lissa (!) sub la

---

[11] »I long to hear more particulars of Dr. Wilkins philosophical character. Mr. Comenius hath sent lately to Mr. Dalgarno his idea of it; but it is so short and general, that it is not worth the imparting.« — Dr. J. Kvačala, *Korrespondence J. A. Komenského* II, 213.

[12] Vidu pri ĝi en la Nro 1. pĝ. 4.

[13] Dr. J. Kvačala: *Korrespondence J. A. Komenského* II, 295–301 dial. 97, kaj paĝ. 301, alineo b.

[14] Dr. J. Kvačala: *Korrespondence J. A. Komenského* II, 158, CXXV.

nomo „*Clamores Eliae*“ kaj enhavanta nur la pensojn, nurajn aforismojn por la „*Pannuthesia*“, estas laŭ la citita letero de Nigrin pli ol verŝajne.

Ke fine Comenius tute ne forgesis sian ideon lingvan nek en sia „cigna kanto“, en „*Unum necessarium*“ el la j. 1668, nek en sia, verŝajne la lasta verko, „*Triertium catholicum*“ (Triarto universala – logiko, gramatiko kaj pragmatiko (praktiko) -- finita eble $2^1/_2$ monatojn antaŭ lia morto, tion atestas eble sufiĉe konvinke en „*Unum necessarium*“ § 6. de ĉpt. I., §§ 8. kaj 20. de ĉpt. II., § 4. de ĉpt. III, §§: 5., 8., 10. de ĉpt. X., kaj en la „*Triertium catholicum*“ almenaŭ §§: 1., 6. kaj 8. de antaŭparolo.

Kaj tiel oni vidas, ke la ideo de artefarota lingvo universala ne estis por Comenius la sola ia meteoro, sed vere „la verda stelo de espero,“ la unu necesero . . . Ja skribinte en „*Unum necessarium*“ (X, 8) la vortojn: „mi decidis disdividi la necesaĵojn al proksimuloj, sed la restaĵon (kio estus tiel por la proksimuloj kiel por mi ŝarĝo) pli volonte per fajro pereigi ol pli longe konservi“, Comenius ankoraŭ post tio, en aprilo de tiu sama jaro 1668, sendas al la malfermo de la „Royal Society“ en London, en kiu li vidis la komencon de efektivigado de siaj ideoj pri plibonigo de la mondo, ĵus eldonitan libron „*Via lucis*“, skribitan jam en la j. 1642, kun letero el la 1. IV. 1668, en kiuj li denove aperas kiel vera „viro de sopiro“ kaj profeto, vidanta ankaŭ en la nova, artefarota lingvo universala unu neceseron. . . .

(Daŭrigo.)

## La instruisto en Danujo.

De *P. Zoffmann*, instruisto en Kolding (Danujo).

**La edukado** de estonta instruisto daŭras 3 jarojn; sed antaŭ la akcepto en la seminarion, oni devas partopreni dum 1 jaro en lerneja instruado sub la gvido de instruisto. Krom tio oni devas havi certan kvanton da diversaj scioj kaj aĝon ĉirkaŭ 18 jaroj. Dum 3 jaroj oni lernas pli multe da ĝeneralaj scioj, kiuj estas bezonaj por la profesio de instruisto; la alilandajn lingvojn oni kutime ne lernas. La ekzameno konsistas el 2 partoj: la unua post la dua jaro, la dua post la tria jaro.

En Danujo ekzistas 4 ŝtatseminarioj – sole por viroj – kaj multaj seminarioj privataj, el kiuj kelkaj por viroj, kelkaj por virinoj kaj kelkaj por geviroj. Ĝis nun ne estas postulata speciala kvalifiko por esti estro aŭ instruisto en la privata seminario, kvankam tiuj ĉi ricevas subtenon de la ŝtato.

Plie ekzistas „antaŭlernej-seminarioj“, en kiuj estas edukataj instruistinoj, kiuj instruas en multaj vilaĝoj la malgrandajn infanojn. Tie la virinoj studas nur 2 jarojn. Inter ĉi tiuj seminarioj estas unu ŝtatseminario.

En lastaj jaroj la plimulto de instruistoj pli kaj pli forte postulas la plibonigon de instruistedukado. Precipe ni postulas, ke la gejunuloj devas lerni pli multe antaŭ ol ili venas en la seminarion kaj ke ili lernu tie ankaŭ la lingvojn germanan kaj anglan, ke la seminaria studado daŭru 4 jarojn, ke la geseminarianoj havu pli grandajn ŝtatsubtenojn kaj ke la privataj seminarioj estu sub pli severa kontrolo. Ni ankaŭ deziras la plibonigon de instruado en pedagogio kaj ekzercadon en diversaj metodoj.

Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne povas atendi la plenumon de ĉiuj niaj postuloj kaj deziroj, ĉar la kultministro prezentis la leĝproponon al la parlamento sen la postulo de alilandaj lingvoj kaj plilongigo de studado ĝis 4 jaroj . . .

**La salajro.** Kiam la seminariano finis sian studadon kaj faris la ekzamenon, li devas esti la unuan jaron vikarinstruisto aŭ instruisto de privata lernejo. Poste li fariĝos 2-a instruisto en vilaĝo kaj kiam li estis instruisto dum 2 jaroj kaj lia aĝo atingis 24 jarojn, li povas ricevi firman oficon kiel 1-a instruisto en vilaĝo aŭ urbinstruisto.

La salajro en la urboj:

| | por instruistoj | por instruistinoj |
|---|---|---|
| la komenca salajro | 833 aŭ 888 Sm | 777 aŭ 833 Sm |
| post 4 jaroj | 944 – 1000 — | 833 – 888 — |
| — 4 — | 1111 – 1166 — | 888 – 944 — |
| — 4 — | 1277 – 1333 — | 944 – 1000 — |
| — 4 — | 1444 – 1500 — | 1000 – 1055 — |
| — 4 — | 1611 – 1666 — | 1055 – 1111 — |

La superinstruistoj havas komence 1666 aŭ 1777 Sm, kiu salajro en 12 jaroj leviĝas ĝis 2166 aŭ 2322 Sm kaj ili instruas nur 24 horojn semajne, dum aliaj geinstruistoj – 36 horojn. En Kopenhago la salajro estas pli alta, la finsalajro – 2000 Sm.

La salajro en la vilaĝoj:

| | por 1-a instruisto | | por 2-a instruisto | por instruistinoj |
|---|---|---|---|---|
| la komenca salajro | 500 ĝis 777 Sm | la 3 unuaj jaroj | 388 ĝis 500 Sm | 388 ĝis 500 Sm |
| post 4 jaroj | 611 — 888 — | post 3 jaroj | 472 — 583 — | 472 — 583 — |
| — 4 — | 722 — 1000 — | — 3 — | 555 — 666 — | 555 — 666 — |
| — 4 — | 833 — 1111 — | — 3 — | 639 — 750 — | 639 — 750 — |
| — 4 — | 944 — 1222 — | — 3 — | 722 — 833 — | 722 — 833 — |
| — 4 — | 1055 — 1333 — | — 4 — | 833 — 944 — | 722 — 833 — |
| | | 4 — | 944 — 1055 — | 833 — 944 — |

Ĉiuj ricevas tiel la finsalajron post 20 jaroj.

Ĉion por 36 horoj. Plie ili havas loĝejon, brulaĵon kaj ĝardenon, la 1-aj instruistoj por geedzoj, la aliaj nur por si mem.

La „antaŭlernej-instruistinoj" havas komence 305—388 Sm kaj fine post 12 jaroj 529—611 Sm kaj krom tio apartenas al ili loĝejo ktp. — kiel al aliaj instruistinoj.

Tiuj ĉi salajroj estas fiksitaj per la leĝo de la 27. V. 1908. Antaŭe la salajroj estis multe pli malgrandaj.

La elspezoj por la salajroj de instruistoj estas dividitaj inter la ŝtato kaj komunumoj tiel, ke la komunumoj havigas la komencsalajrojn kaj la ŝtato la aldonaĵojn.

La servjaroj de instruistoj estas kalkulataj nur tiam, kiam la instruistoj estas 24-jaraj kaj de la ekzameno pasis jam 2 jaroj.

(En privataj lernejoj la salajroj estas tre diversaj, sed ĝenerale pli malgrandaj; ĉar tiuj ĉi lernejoj ofte kontentiĝas kun gejunuloj sen instruista ekzameno. Ili ricevas subtenojn de la ŝtato.)

**La pozicio de la instruisto.** *I. En la lernejo.* Kiam la instruistofico estas neokupita, la urba aŭ vilaĝa konsilantaro proponas 3 kandidatojn kun la bezona kvalifiko, el kiuj poste la lernejdirekcio elektas unu personon. Firme okupata instruisto povas esti eksigita nur post la juĝa kondamno aŭ se la $^3/_4$ de la lernejkomisio kaj de la urba aŭ vilaĝa konsilantaro tion postulas.

Ĉiu instruisto mem havas la respondecon pri sia instruado. La inspektado de instruado kaj lernejo estas farata per la lernejkomisio, en kiu la paroĥestro estas membro (en vilaĝoj prezidanto) kaj la lernejdirekcio, en kiu ankaŭ la ĉefpastro estas membro.

Estas nome la pastroj, kiuj inspektas (observas) la geinstruistojn, sed tiuj ĉi havas ĝenerale grandan liberecon koncerne la instruadon, ĉar multaj pastroj bone vidas, ke ili ne povas inspekti korektmaniere kaj tial ili lasas al la instruistoj liberecon fari ĉion laŭ sia bontrovo. Kvankam la inspektado tiel estas tre humana, tamen la plimulto de la instruistoj deziras alian inspektadon. Ni postulas rajton direkti mem niajn proprajn aferojn anstataŭ stari sub alia potenco kaj ni deziras havi pedagogie edukitajn kaj konsildonantajn inspektorojn. Kaŭze nia mankhava edukado ni ofte bezonas bonan konsilon pri la instruado. Nun al juna instruisto mankas efektive kompetenta gvidanto kaj tial li ofte palpetas. Tial estus grandsignifa afero por la dana lernejo, se ĝi ricevus inspektorojn, kiuj — sen uniformigi la lernejon per postulo de la sama

metodo por ĉiuj – povus helpi al la instruistoj trovi la metodon, kiu estus por ĉiuj plej bone uzebla.

La rilato inter geinstruistoj kaj gelernantoj ĝenerale estas bona. La geinstruistoj havas rajton uzi korpan punadon, sed la uzo de tiu ĉi rimedo estas malofta.

Por doni la bezonan fortecon al siaj postuloj, la geinstruistoj estas organizitaj en diversaj asocioj. El ĉi tiuj la plej gravaj estas: la asocio de instruistoj en Danujo, en kiu ĉiu instruisto povas esti membro, la asocio de urbaj instruistoj kaj la asocio de instruistoj en Kopenhago. La unua asocio estas la plej granda kaj havas pli ol 7.000 membrojn. Nun ni celas kunigi la tri nomitajn asociojn en komunan organizaĵon. Ĉiuj supre cititaj asocioj eldonadas por siaj membroj apartajn gazetojn.

Ofte estas farataj pli malgrandaj kunvenoj aŭ gravaj kongresoj. Dum la dana lernejkongreso en Kopenhago 1907 ni esprimis niajn postulojn pri la salajro, edukado kaj inspektado de instruado, kio havis grandan signifon por la leĝo pri niaj salajroj.

*II. Ekster la lernejo.* Kiel membro de la socio la instruisto havas la saman pozicion kiel aliaj viroj. Li ne havas prerogativojn, sed ankaŭ ne apartajn devojn. Tamen li devas aparteni al la popoleklezio (luterana). Sed en la plej lastaj jaroj ĉi tiu afero ne estis rigardata tiel severe, ĉar antaŭ ia tempo en la urbo Frederiksberg fariĝis superinstruisto viro, kiu estas liberpensulo kaj antaŭ nelonge en la urbo Esbjerg ricevis oficon unu virino, kiu apartenas al eklezio metodista. – Hodiaŭ ankoraŭ la pli multo de geinstruistoj deziras teni en la lernejo la instruadon de la religio, sed la movado por la lernejo senkonfesia kreskas ĉiutage ankaŭ en nia lando.

Instruisto devas esti soldato, pagi urb- kaj ŝtatimposton ktp., sed li ankaŭ povas havi tian politikan pozicion, kian li volas kaj li povas esti membro ne nur de urba kaj vilaĝa konsilantaroj, sed ankaŭ de la parlamento.

En la parlamento estas kelke da instruistoj, apartenantaj al diversaj partioj politikaj. Unu el ili estis dum la jaroj 1901—05 la ministro de kulto kaj 1905–08 la ĉefo de ministraro kaj ministro de milito. Tiel estas eble por instruistoj atingi la plej altajn poziciojn politikajn. Entute la instruistoj partoprenas multe en la politika vivo, sed ili apartenas al plej diversaj partioj: unuj estas konservativuloj, la aliaj liberaluloj aŭ social-demokratoj.

La instruistinoj havas la saman pozicion kiel aliaj virinoj kaj egale kun ili, mankas ankaŭ al instruistinoj la elektrajto al parlamento. Sed laŭ la leĝo el la 20. IV. 1908 ili havas elektrajton al

urbaj kaj vilaĝaj konsilantaroj kaj ĉe la antaŭ nelonge entreprenita elektado, kelke da lokoj okupis ankaŭ instruistinoj. – En 46 de la danaj urboj estis elektitaj entute 45 instruistoj kaj 16 instruistinoj.

## La instruistoj en Montenegrujo.

De la pastro *Risto M. Popovič-Čupič*, instruisto en Danilovgrad (Montenegrujo).

De la jaro 1907 la granda popola parlamento kreis la leĝon pri elementaraj lernejoj en Montenegrujo. Ĝi enhavas 83 paragrafojn. En la § 33-a oni legas pri instruistoj: La instruistoj estas definitivaj (konstantaj) kaj nedefinitivaj. En la vira popola lernejo laboras instruistoj, en la virina lernejo instruistinoj.

Definitivaj geinstruistoj povas esti tiuj personoj, kiuj estas regnanoj de Montenegrujo kaj kiuj kiel ordinaraj lernantoj finis la Instruistan Lernejon (seminarion) aŭ la Virinan Instruistan Lernejon kaj en ili faris la instruistan ekzamenon de matureco. Kiu volas fariĝi instruisto, tiu devas studi 4 jarojn en la popola lernejo, 4 jarojn en la gimnazio kaj 4 jarojn en la Instruista Lernejo aŭ Virina Instruista Lernejo. Nedefinitivaj instruistoj estas tiuj personoj, kiuj studis 4 jarojn en la Instruista Lernejo, sed ne faris la ekzamenon de matureco, kiuj finis la studadon en la pli alta Virina Lernejo kun aŭ sen ekzameno de matureco, gimnazion, realan lernejon kun aŭ sen ekzameno de matureco kaj teologian seminarion.

Nedefinitivaj geinstruistoj povas fariĝi definitivaj, se ili faris ekzamenon de matureco laŭ la regularo eldonita de la ministro.

Definitivaj geinstruistoj ricevas en la komenco de sia servo ĉiujare la salajron 960 kronojn (1 Sm = 2·40 K). Por ricevi la unuajn du pliaĵojn, oni devas servi po 5 jaroj kaj por aliaj po 4 jaroj. Entute ekzistas 6 pliaĵoj po 240 K. Post 26-jara servado oni ricevas jare 2400 K kaj ĉi tiu salajro daŭras ĝis 32 jaroj, post kiuj la instruisto ricevas plenan salajron (2400 K) kiel pension ĝis la morto.

Ĉiu definitiva instruisto havas rajton ricevi post 10-jara servado (en la okazo de malsano korpa aŭ anima) pension da 40% de sia lasta salajro. La pensio pligrandiĝas ĉiujare je 2·72%. La definitiva instruisto, kiu servis malpli ol 10 jarojn, en la okazo de malsano ricevas 30% de sia lasta salajro. La vidvinoj de instruistoj kaj iliaj infanoj kaj instruistinoj ricevas pension laŭ la leĝo por popolaj servuloj (oficistoj). Nedefinitivaj geinstruistoj ricevas la salajron 720 K jare kaj ili devas fari la ekzamenon de matureco plej longe post 5 jaroj aŭ ili devas ĉesi esti instruistoj. La salajron aŭ pension ricevas ĉiuj instruistoj el montenegruja kaso.

La estraroj por elementaraj lernejoj estas jenaj: 1. lerneja komitato, 2. instruestro de popola lernejo, 3. instruista kunveno, 4. lerneja inspektoro.

En ĉiuj lernejoj popolaj, kie estas 2 aŭ pli multe da instruistoj, la ministro nomas unu instruiston por esti estro de la lernejo. Kie estas nur 1 instruisto, li mem faras la estran laboron. Estro povas esti la instruisto definitiva. Sed en la okazo, ke ne ekzistas tia instruisto, povas esti estro ankaŭ instruisto nedefinitiva. La estro ricevas aldonon de la komunumo 100 K jare, sed nur en la okazo, se la lernejo havas kun li plej multe 5 instruistojn, sed se la lernejo havas nur 3 instruistojn, la estro ricevas jare 60 K.

La inspektoroj havas rangon kaj salajron kiel profesoroj de mezaj lernejoj. La inspektoro ricevas por la vojaĝado en la lerneja distrikto 400—1000 K jare. La inspektoroj estas 3 kaj la lokon de ilia kancelario nomas la ministro. La inspektorojn nomas lia moŝto Princo de Montenegrujo. La skribistan laboron faras unu el instruistoj urbaj, kiun elektas inspektoro kaj por tio la instruisto ricevas 240 K jare. La inspektoro devas viziti ĉiujn lernejojn trifoje dum la jaro.

En Montenegrujo estas 160 instruistoj kaj 130 popolaj lernejoj.

Nuna ministro de instruado estas s-o Dro S. Drlevič. Li estas juna homo, scienculo kaj bona oratoro.

## La popolaj lernejoj en la norvegaj vilaĝoj.

De *Nils Ökland*, instruisto en Skaare-Haugesund (Norvegujo).

Laŭ la „leĝo pri instruado" de la 26. de junio 1889 en „ĉiu komunumo devas esti la necesa nombro da popolaj lernejoj".

Tial la komunumoj estas partigitaj en „lernejajn rondojn", el kiuj ĉiu havas sian propran lernejon. En la lernejoj oni instruadas laŭ 2 gradoj. La 1-a grado estas por infanoj de 7—10 jaroj; la 2-a por infanoj de 10—14 jaroj.

Laŭ la nombro de infanoj, la riĉeco de komunumo ktp., ĉiu grado estas dividita en pli aŭ malpli da klasoj (ekz. en 2 aŭ 3 aŭ eĉ 4 kl.). La klaso devas havi jaran instruadon almenaŭ dum 12 semajnoj; semajno havas por la 1-a grado 30 instruadajn horojn, por la 2-a grado 36 horojn.

Instruaj fakoj, ordonidaj per la leĝo estas: en la 1-a grado: religio, gepatra lingvo, kalkulado, skribado, kantado kaj prepara instruado (sen lernolibroj en historio, geografio ktp.).

En la 2-a grado (krom la fakoj jam nomitaj por la 1-a grado): geografio, historio, naturfakoj (kun sciigoj pri la danĝeroj por la homa organismo, kiujn kaŭzas la alkoholaj trinkaĵoj). Krom tio ĉi almenaŭ unu el la 3 fakoj: manlaboroj, desegnado, gimnastiko.

Por ĉiu infano, loĝanta en la komunumo, la instruado estas tute senpaga. Se infano pro ia aŭ alia kaŭzo ne partoprenas en la lernado (ekzemple ĉar la gepatroj ne estas ortodoksuloj), tiam la gepatroj estas devigataj prizorgi, ke la infano ricevu istruadon, egalvaloran al tiu de la popola lernejo.

La salajroj de geinstruistoj estas:

Por unuagrada instruado Sm 7·70 posemajne
— duagrada — Sm 9·90 —

De tiuj ĉi elspezoi la komunumo mem pagas 2 trionojn kaj la regna kaso 1 triononon.

Post 4, 8, 12 kaj 15-jara servado la geinstruistoj ricevas aldonojn (jarajn), ĉiufoje pli grandaj je:

por la 1-a grado Sm 33
— 2-a — Sm 55

Post finita servado ili ricevas pensiojn el la regna kaso.

Por gvidi kaj kontroli la lernejojn la komunumo havas „lernejan estraron“, kies membroj estas elektitaj de la komunuma estraro. En la „lerneja estraro“ ankaŭ la geinstruistoj havas sian reprezentanton, elektitan de ili mem.

Superan kontrolon havas la „lerneja direktoro“, unu por ĉiu eparĥio.

## La instruistaj »Amikaroj« en Francujo.

En 1885, ĉe la instruista kongreso en Le Havre, estis diskutita unuafoje la temo: instruistaj asocioj. La nuna ministro de la publika instruado sendis poste cirkuleron por montri la neeblecon de tiaj asocioj. Tamen la departemento de la Nordo posedis tiam tridek kvinjaran asocion de instruistoj.

La ĉefa principo de tiuj asocioj estas kunigi la fortojn, la rimedojn de la grupatoj kontraŭ la fremdaj (ofte politikaj) enmiksiĝoj — defendi la anojn kaj atingi la maksimumon da profitoj. Iom post iom la departementaj asocioj plimultiĝis kaj, dank' al la 1901-a leĝo, preskaŭ ĉiu departemento baldaŭ havis sian asocion ĝenerale nomitan „Amicale“ (Amikaro). Iuj eĉ havis kelkajn, kies celo estas la sama; tio estas malbona, ĉar tiu divido, kiu naskiĝis de personaj influoj, alkondukas al vanaj diskutoj, deflankigante la ĉefan celon: almiliton de pluaj korporaciaj profitoj.

Sen kunligo tiuj amikaroj povis fari nenion. Estas necese, ke ili federaciiĝu. Administranta konsilantaro kunsidis en Paris (1902) kaj prilaboris statutojn, kiuj iom ŝanĝitaj estis akceptitaj. Poste tiu konsilantaro elektis konstantan komitaton de 11 anoj enhavantan kelkajn instruistinojn.

La amikaroj agas dumaniere:

1. loka per siaj estraroj kaj la administrantaj konsilantaroj;

2. ĝenerale:

*a)* per la administranta komitato de la federacio, konsistanta el delegitoj de ĉiuj amikaroj;

*b)* per la konstanta komitato kaj ĉefe per la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario.

La agado de la amikaroj estas universala pri la lerneja fako. Ili agas pri la instruistoj (salajro, stato, senriskeco, sendependeco, maljustaĵoj ktp.); pri la lernejoj (loĝejoj, programoj ktp.), pri la lernantoj (kunedukado, metodoj, nenormalaj infanoj). Ili estas naciaj kaj internaciaj (kongreso en Liège 1905 kaj Internacia estraro de la instruistaj federacioj). Konsekvence, ili devas havi realan influon pri la edukado, la popoloj kaj la diversaj naciecoj.

La franca federacio havis jam 4 kongresojn: Bordeaux 1901 — Marseille 1903 — Lille 1905 — Clermont 1907. Tiu 1909-a okazos en Nancy. En la j. 1910 en Paris kunsidos la unua internacia kongreso organizita de la nova internacia federacio.

Jen la atingitaj rezultatoj:

Post la 1885-a kongreso, kiu pretigis la leĝfundamentojn, estis farita la 1889-a salajroleĝo — sub la influo de la unuaj gruparoj kaj de la pedagogia gazetaro. Tiu leĝo estis kelkefoje plibonigita. La procentado malaperis kaj estis anstataŭita per la gradaltiĝo preskaŭ meĥanika.

Oni preparis laŭ la plej liberalaj ideoj refaradajn proponojn rilatajn al oficdono, gradaltiĝo, disciplino, translokiĝo, respondeco ktp.

Malpli ĝeneralaj interesoj ankaŭ okupas la amikarojn: defendo de kolegoj atakitaj de privatuloj aŭ turmentitaj de komunumestraroj. Ili havas jurajn konsilantojn, kiuj montras, kion oni povas fari, flanke de la juĝistaro.

Lastatempe iuj politikaj ideoj instigis kelkajn instruistojn, precipe parizajn, eniri en la Laborajn Borsojn (loĝejoj de la laboristaj sindikatoj). Tial ili fondis instruistajn sindikatojn, kredante tion ebla laŭ la 1905-a leĝo. Sed ĉiam la publikaj aŭtoritatoj rifuzis al ili leĝan ekzistadon kaj rifuzis ĉian rilaton kun ili, sekve ilia agado estas nepre malgranda aŭ pli vere malbona. Tial la

sindikatoj ne daŭros: ekzemple tiu de la orientaj Pireneoj, kiuj ĵus aliformiĝis.

Ĝenerale la amikaroj havas bultenon periodan, per kiu la amikestraro konigas la decidojn de la komitato, la novaĵojn interesajn pri la instruado, la prilaborotajn temojn kaj publikigas diversajn informajn artikolojn ktp.

La federacio havas egale sian organon.

En mia departemento (Ardennes) la amikaro kalkulas pli ol 1100 anojn, t. e. preskaŭ la tuton de la geinstruistoj. La kotizo estas 1·50 fr. (0·6 Sm).

Kiel ekzemplo de kongresaj laboroj mi citas:

K o n g r e s o e n L i l l e 27—30-an aŭguston 1905: Kunedukado. Metodoj por la historia instruado. Devigaj translokigoj.

K o n g r e s o e n L i è g e 4—7-an septembron 1905. La unuagrada instruisto. — La deviga instruado. — Kondiĉoj, en kiuj troviĝas la nuna lernejo. — La lernejo kaj la universala paco. — Kunlaboro de la geinstruistoj kaj de la familioj. — Internacia estraro de la a m i k a r o j.

*Paul Benoit,*
komitatano de la Ardenna Amikaro.
(Mouzon-Ardennes-Francujo.)

# La III-a internacia kongreso pri la instruado de desegnado.

De *G. R. Mills*, Blackpool (Anglujo).

La konstruaĵoj de la Londona Universitato ĉe South Kensington, London, estis la scenejo de granda agado dum la unua semajno de aŭgusto 1908. Delegitoj ĝis la nombro de 1800 kunvenis de ĉiuj partoj de la terglobo: tio estis pli ol triobla nombro, kiu kunvenis ĉe la u n u a kongreso en Paris antaŭ ok jaroj kaj certigas frapantan ateston pri la disvastiĝo de arto kaj arta instruado kiel sennankohava parto de edukado.

La prezidanto (Grandsinjoro Carlisle = Karlajl), parolante intersekve angle, france, germane (s e d n e E s p e r a n t e !), bonvenis la delegitojn. Preskaŭ ĉiu eŭropa nacio kaj brita kolonio estis oficiale reprezentita, kiel ankaŭ Usono, Japanujo, Skotlando kaj Irlando; entute estis reprezentitaj ĉirkaŭ 40 nacioj.

Estas tute neeble priskribi la treege interesajn skribaĵojn, kiujn oni legis kaj diskutis.

De pli granda intereso ol legi aŭ aŭdi „metrojn da kompostaĵo" estis vidi la kunvenon de tiom da viroj kaj virinoj, kies

nomoj estas „domvortoj“ inter geinstruistoj en multaj landoj. Kaj kiel ofte la homo estis la ĝusta kontraŭo de nia antaŭopiniata ideo! Inter aliaj oni observis s-on M. Fritschi (Svisujo), kiu parolis ofte kaj bone; la entuziasmulo s-o E. Cook (Anglujo); s-o Taylor (Anglujo), unu el la unuaj instruistoj de arto, kiu studis la bezonojn de la elementara lernejo en Anglujo; s-o H. Bailey (Ameriko); s-o M. Guébin (Paris); s-o Friese (Hannover) kaj s-o Sykes M. A., la prezidanto de la Brita Nacia Unio de Geinstruistoj.

La kongreso kaj la ekspozicio, oni povas diri emfaze, estis granda sukceso — triumfo de organizo kaj aranĝo.

De elstaranta intereso kaj graveco estis la vasta montraĵo de la ellaboraĵoj de lernantoj organizita ĉe tiu ĉi kongreso. Eble ĝian similaĵon oni neniam antaŭe vidis. La miriga kaj kontentiga elstaraĵo pri la ellaboraĵoj estis la unuanimeco de la celo montrata de ĉiuj landoj. Arto ja estis provita esti universala lingvo

Pli multe da zorgemo ŝajne estis donita al la pli altaj desegnaĵoj el duagradaj teknikaj kaj artaj lernejoj ol al tiuj el la ordinaraj elementaraj lernejoj. Estis tamen sufiĉe da materialo el la lastaj por kontentigi la plej grandan elektemulon.

Mi diros larĝe, ke la ellaboraĵo el Finnlando kaj la nordaj landoj ĝenerale, havas familian similecon, t. e. skandinavian tendencon al forta koloro, kvadrata konturo (speciale en la desegnaĵoj de birdoj kaj plumaro) kaj amo por simpleco kaj „larĝeco“. En tiu kolektaĵo la elementaraj lernejoj ne estis sufiĉe reprezentitaj, kvankam estis kelkaj admirindaj „bestetoj“ kaj formiloj modelitaj de Finnlandaj fingretoj; dume oni vidis ĉi tie kaj tie ekzercon, per kiu oni ŝajne kuraĝigas en iuj landoj, la uzon de la silueto (silhouette). Ekzemple, en Ameriko kaj Aŭstrio la infanoj observas knabon tenantan libron kaj poste ili desegnas la ĉefajn trajtojn kaj plenigas la spacon nigre. En Aŭstrio la infanoj ankaŭ eltranĉas la siluetojn el kolorigita papero.

Plenigante ĉiun angulon sur la teretaĝo estis la ekspozicietoj de Skotlando, Irlando, Kimrujo kaj kelkaj anglaj urboj. En la supra ĉambro estis la desegnaĵoj el London, Ameriko kaj la eŭropaj nacioj, kie estis „ŝipŝarĝoj“ da ellaboraĵoj. La aŭstria kaj hungaria partoj estis fortaj kaj bone ricevitaj de la anglaj instruistoj kaj persone mi pensas, ke iom da la plej bona ellaboraĵo de la ekspozicio venis el Aŭstrio.

Ameriko estas vasta lando kaj ĝi havis vastan ekspozicion; la desegnaĵoj el tiu lando estis bonegaj kaj bonege aranĝitaj. Tre bonaj estis la desegnaĵoj el Danujo, Svedujo kaj Svisujo. Nenio

tamen de infanoj sub la aĝo de dekdu jaroj estis videbla el tiuj landoj.

La plej malkontentiga ekspozicieto, laŭ mia opinio, estis el artema Francujo. La francoj eble estas nacio de artistoj, sed tio ne estis videbla en la montritaj lernejaj desegnaĵoj.

Estas tre malfacile priskribi eĉ partumon de tiu vasta kolektaĵo. Por la instruisto de desegnarto la ekspozicio estis treege valorplena kaj la efiko je la instruado de arto estos tre vasta kaj utilega.

Tre atentinda estis la preskaŭ tuta foresto de skizo per plumbkrajono. Koloro kaj lumo kaj duonlumo per diversaj periloj estis universale evidentaj.

# Rimedo por veki amon por la naturo kaj patrujo en niaj lernantoj.

De *G. Becker*, instruisto en Riede (Hannover, Germanujo).

Ĉiuj homoj interkonsentas, ke la lernejo devas esti ne nur ejo por lernigi, sed ankaŭ por edukadi geknabojn. Tiu ĉi edukado devas esti tiel intelekta, kiel ankaŭ korpa. La lasta punkto tamen ne estas sufiĉe atentita, almenaŭ ne en Germanujo. Tiom pli ĉiu vera instruisto ŝatas ĉiujn klopodojn, kiuj celas harmonian perfektigadon de niaj geknaboj. Eble interesos miajn kolegojn, kion mi diros pri la „Wandervogel“ (Migrema Birdo).

„Wandervogel“ estas interligo de homoj el diversaj profesioj; la plej granda parto estas instruistoj. Ĝia tasko estas elkonduki la geknabojn el mallarĝaj urbaj stratoj en la liberan naturon kaj tiamaniere veki amon kaj komprenon por ĝi. La elspezoj de tiuj ĉi vojaĝetoj devas esti kiel eble plej malgrandaj. La partoprenontaj geknaboj informas la kondukonton, kiu estas plej ofte instruisto konata de la lernantoj, kelkajn tagojn antaŭe pri ilia decido kaj la gepatra permeso. Poste la kondukonto faras ĉiujn necesajn preparojn. La daŭro de la migraj vojaĝoj ne estas egala: 1 tago ĝis 3 semajnoj. Tiuj vojaĝoj, kiuj daŭras pli longe ol 1 tagon, estas efektivigataj en la libertempo, precipe la somera. Kvankam estas permesite uzi fervojon, plej ofte la junaj migrantoj marŝas piede, kio ja ankaŭ estas pli malkara kaj pli utila. La „migremaj birdoj“ vizitadas montarojn, lagojn, la maron kaj aliajn naturajn belaĵojn, urbojn, historie rimarkindajn lokojn ktp. Ĉiu portas bastonon kaj skatolon aŭ alian konservujon por manĝaĵoj kaj kun kantado ili vagas tra arbaroj kaj kamparoj. Gastejoj dum la tago ne estas bezonaj, ĉar la „migremaj birdoj“ kuiradas mem sian

manĝaĵon. Kelkaj portas kun si kuirilojn kaj brulalkoholon. Cetere, kiel trinkaĵo alkoholo en kia ajn formo estas malpermesita.

Vespere la migrantoj vizitas malkaran vilaĝan gastejon por tie ripozi dum la nokto. Iom da pajlo aŭ fojno kaj kelkaj kovriloj sufiĉas al la knaboj por prepari noktkuŝejon. La venontan matenon ili marŝas pluen kun novaj fortoj.

Mi montras tie ĉi la programon de du el tiaj lernant-vojaĝoj, eltiritan el la gazeto „Wandervogel", monata organo de la interligo, Nro 4-a, jaro 1907 (la I-a jarkolekto): I. Tra Schleswig-Holstein, Alsen, Fünen (3 aŭ 4 tagojn en Danujo), Flensburg, Eckernförde, Kiel — 22 tagoj (de la 13-a julio ĝis la 3-a aŭgusto). — II. Tri semajnojn por la suda Schwarzwald, Rhein, Bodensee, norda Svisujo.

Feliĉaj infanoj! — Unu el niaj germanaj poetoj diras — Dro Zamenhof ĝin tradukis:

Se donos Di' al vi favoron,
li sendos vin for el la dom',
por montri sian mirlaboron,
la belan mondon, al la hom'.

# Praktika propono pri internacia kurso de lerneja manlaboro.

De prof. *Alessandro Mazzolini*, Perugia (Italujo).

Estas deziro de multaj kolegoj trovi rimedon por estigi ĉiujaran amikejon de geinstruistoj. Por allogi al tia amikejo kiel eble plej nombrajn kolegojn, helpus doni al ĝi celon ne nur esperantistan, sed esperantistan kaj pedagogian samtempe.

Post naŭ monatoj de lerneja laborado la geinstruistoj bezonas iom da ŝanĝo en iliaj sidaj okupadoj, iom da amuziĝo: necese estas do trovi ion samtempe utilan kaj agrablan: „utile dulci". Ĉi ion eble oni jam trovis: ni diskonigos al niaj legantoj ideon, kiu eble povus sukcesi; ĉi tiu ideo rilatas la ĉiujaran starigon de tri- aŭ kvardektagaj kursoj de lerneja manlaboro, kiu finiĝus per lerneja manlabora kongreso. Oni povus tre utile profiti la okazon por estigi samtempe alian taŭgan kongreson, kiu interesus la tutmondan elementaran instruistaron.

Esperantista kongreso pri lerneja manlaboro estus pli grava, pli utila, pli sukcesa, se ĝi sekvus manlaboran kurson: la trakteblaj argumentoj havus praktikan bazon, kaj oni povus juĝi pri la praveco de l' diversaj teorioj kaj proponoj ne sin bazante sur nu-

raj vortoj (ne ĉiam precize komprenataj), sed ankaŭ sur, mi dirus, tuŝeblaj argumentoj.

La plej ĝusta kaj plena priskribo de maŝino povas nin konvinki, ke ĉi tiu mekanikaĵo estas ebla kaj taŭga: ni konstruigas ĝin kaj domaĝe ni konstatos, ke malgraŭ ĉiuj antaŭaj plenaj studoj kaj detalaj kalkuloj, nia maŝino ne funkcias. Didaktika novaĵo estas ofte komplikita, delikata maŝino, kies tasko postulas ne nur teoriajn, sed ankaŭ praktikajn provojn.

Ĉe ĉiu tri- aŭ kvardektaga kurso oni povus sin ekzerci pri du branĉoj de lerneja manlaboro, kaj ĉe la unua kurso (en la aŭgusta kaj septembra monatoj 1909) oni povus elekti plastikon kaj kartonlaboradon.

Facile estus aranĝi programon taŭgan, ĝenerale, al tutmonda elementara instruado: dependus poste de la kriterio de ĉiu kolego aliformigi la lernitan programon, plue perfektigi la akiritan lertecon, ĉion alfarante laŭ la karaktero, la bezonoj, la emoj, la tradicioj de sia lando.

En la dua kurso (aŭgusto-septembro 1910) oni aldonus al ambaŭ la diritaj, du aliajn branĉojn de ekzercado kaj studado; en la tria (1911) ankaŭ aliajn du (eble la lastajn, por ne igi tro ampleksa tro eklektika la kurson), sed en ĉiu kurso la ĉeestantoj ne povus lerni pli ol du branĉojn, kiujn ili elektus. Post tri jaroj oni estus fininta la tutan kursaron, sed la kursoj stariĝus ĉiujare.

La studado de desegno akompanus ĉiam ĉiun branĉon de ekzercoj, sed desegno devus havi celon senpere, precipe utilan al manlaboro, ne abstraktan kaj teorian.

Ĉiuj instruistoj kaj ĉiuj lernantoj devus doni al la kurso kunhelpon, ne nur esprimante kaj diskutante ĉe ĝi siajn ideojn pri manlaboro, ideojn kiuj estus frukto de ilia sperto kaj studado, sed ankaŭ kunportante al ĝi la plej taŭgajn modelojn, ĉu realajn, ĉu desegnitajn. Tiel agante ili amasus ĉe l' esperanta ĉiujara kurso de manlaboro tre gravan kaj multvaloran aron da lerneja materialo, kiu ĉiujare pligrandiĝus kaj pliboniĝus: elektante el ĝi la plej taŭgajn objektojn kaj desegnaĵojn, poste ilin, laŭ didaktika kriterio aranĝante, tiamaniere, ke ili estigu tutaĵon organecan, harmonian, gradigitan, oni baldaŭ estigus bonegan kolekton de manlaboraj imitindaĵoj.

Tiamaniere la kurso, iom post iom, fariĝus vera modelo de manlabora lernejo, kaj la diplomoj de ĝi liveritaj havus ĉiam pli nediskuteblan gravecon, ĉar ĉi tiu graveco devenus ne nur de registaraj dekretoj aŭ leĝoj, sed ankaŭ de la intima valoro de l' afero.

Kaj pri tio, kio rilatas la aprobon de l' registaroj, la afero temus nur pri tempo.

Ĉi tiu propono estas adresata al la gesamideanoj instruistoj, kiuj ŝatas manlaboron ĉu kiel korpan kaj spiritan edukadon, ĉu kiel didaktikan helpon, ĉu kiel praktikan preparadon por la vivo, kaj eĉ por la precipaj metioj, ĉu, fine, kiel korektaĵon kontraŭ la lerneja trosideco, kaj kiel rimedon por igi malpli unutonan, pli ŝanĝan kaj gajan, pli ŝajnan je la familia la vivadon enlernejan. Peni por pruvi al ili, jam konvinkitaj pri la merito de manlaboro, la utilecon de l' proponata institucio, estus do superflue, kiel, parolante al esperantistoj, same superflue estus klopodi por plue pruvi ĝian utilecon kiel ĉiujara amikejo de geinstruistoj.

NB. — Ni petas ĉiujn gekolegojn, kiuj ame sin interesas pri ĉi tiu praktika kaj simpatia branĉo de l' elementara instruado, skribi al ni siajn opiniojn kaj proponojn: pli facile estas konkreti plenan projekton, kiam la kompetentuloj je la traktata afero esprimis siajn ideojn pri la projekto mem.

*La redakcio.*

## Internacia krestomatio por la infanoj.

En nia literaturo ĝis nun mankas legolibro aranĝita speciale por la infanoj. Kiam en la estonteco la infanoj lernos nian lingvon en la lernejoj, ili ĉerpos el la unuaj legaĵoj la internan spiriton de la internacia lingvo. Tiu ĉi interna spirito de Esperanto kunfandiĝos el la specialaj spiritoj de la naciaj lingvoj, kiuj enverŝos siajn trezorojn en la internacian lingvon. La speciala karaktero de iu ajn lingvo montriĝas precipe en la popola literaturo; tial mi petis la diverslandajn esperantistojn per anoncoj en kelkaj gazetoj sendi al mi popolajn fabelojn, fablojn, enigmojn, proverbojn, rakontetojn. Mi ricevis jam sufiĉe da materialo kaj aldononte miajn proprajn tradukojn el la rusa kaj germana lingvoj, mi povos verŝajne dum la jaro 1909 eldoni la delonge bezonatan libron. Sed por la diverseco de la stiloj karakterizaj por diversaj nacioj mi dezirus ricevi ankoraŭ tradukojn de popola literaturo (fabeloj, fabloj, enigmoj k. t. p.) el la sekvantaj lingvoj: dana, norvega, sveda, finna, japana (tre dezirinda!), holanda, hispana, portugala, itala, rumana, turka, araba, persa, bulgara, serba, kroata, slovena, skota, irlanda, pola ktp., el kiuj mi ricevis preskaŭ nenion; ankaŭ el la angla lingvo mi ricevis malmulte; ĉiuj lingvoj de malgrandaj nacioj estas tre dezirindaj.

Mi petas sendi ĉion laŭ la adreso: *Romano Frenkel,* inspektoro de gimnazio, Enisejsk, Rusujo, Siberio — ĝis la monato sep-

tembro 1909; kio alvenos post tiu ĉi dato, aperos en la aldono al la krestomatio; tial oni ne timu malfrui kun la sendado, ĉar mi daŭrigos la kolektadon de materialo ankoraŭ dum kelkaj jaroj.*

Por ĉio sendota mian antaŭan koran dankon.

Kun samideana saluto

*Romano Frenkel,*
inspektoro de la knaba gimnazio en Enisejsk, Rusujo, Siberio, kaj viceprezidanto de »*Internacia Asocio de Instruistoj.*«

## La statistika paĝo.

**Elementara lernejaro en Aŭstrio.** Elspezoj de aŭstriaj landoj (provincoj) por lernejoj elementaraj faras 40% de landaj elspezoj, t. e. 121,057.854 K, el kiuj 107 milionoj estas salajroj por 69.555 geinstruistoj.

Pli klare montras la statistikon de elspezoj por lernejoj kaj salajroj de instruistaro tiu ĉi tabeleto.

| Lando | Instruistoj | Salajro K | Cifero mezonombra K | 1 instruisto por loĝantoj | Elspezo por 1 loĝanto |
|---|---|---|---|---|---|
| Bohemujo | 23.510 | 46,445.344 | 1.995 | 278 | 7·12 |
| Moravio | 8.951 | 16,240.883 | 1.880 | 286 | 6·45 |
| Silezio | 1.559 | 3,288.479 | 2.059 | 462 | 3·57 |
| Aŭstrio Malsupra | 10.695 | 9,002.256 | 1.833 | 295 | 6·03 |
| Aŭstrio Supra | 1.997 | 2,702.120 | 1.337 | 414 | 3·27 |
| Salcburgio | 654 | 899.203 | 1.036 | 310 | 4·41 |
| Stirio | 3.136 | 5,467.985 | 1.678 | 445 | 3·84 |
| Karintio | 1.056 | 1,406.166 | 1.090 | 953 | 3·78 |
| Karniolio | 753 | 1,090.908 | 1.448 | 683 | 2·12 |
| Triesto | 348 | 806.797 | 2.032 | 548 | 4·23 |
| Istrio | 434 | 588.390 | 1.325 | 831 | 1·83 |
| Goricio | 489 | 619.640 | 1.478 | 493 | 2·57 |
| Tirolio | 2.579 | 1,916.997 | 719 | 342 | 2·18 |
| Vorarlbergio | 442 | 490.821 | 1.174 | 309 | 3·60 |
| Galicio | 11.903 | 12,232.035 | 988 | 644 | 1·60 |
| Bukovino | 1.324 | 2,081.990 | 1.572 | 578 | 2·72 |
| Dalmacio | 710 | 836.066 | 1.151 | 863 | 1·36 |

Oni vidas, ke en Aŭstrio plej multe dediĉas por la lernejo la provincoj Bohemujo kaj Moravio. *Krlc.*

**Mezaj lernejoj en Eŭropo.** *Norvegujo* havas 86 mezlernejojn (1 por 26.000 loĝ.). — *Svisujo* 120 (1 por 27.000 loĝ.). — *Italujo* 810 (1 por 40.000 loĝ.). – *Belgujo* 167 (1 por 41.300 loĝ.). — *Hispanujo* 417 (1 por 43.700 loĝ.). – *Francujo* 880 (1 por 44.600 loĝ.). – *Svedujo* 111 (1 por 45.500 loĝ.). — *Nederlando*

* La esperantistaj gazetoj estas treege petataj transpresi mian alvokon.

110 (1 por 46.400 loĝ.). — *Germanujo* 1120 (1 por 54.100 loĝ.). — *Grekujo* 40 (1 por 60.800 loĝ.). — *Aŭstrio-Hungario* 740 (1 por 63.700 loĝ.). — *Rumanujo* 75 (1 por 80.000 loĝ.). — *Portugalujo* 47 (1 por 115.000 loĝ.). — *Rusujo* 1100 (1 por 120 000 loĝ.). — *Serbujo* 10 (1 por 141.000 loĝ.). — *Bulgarujo* 25 (1 por 161.000 loĝ.).

*Ks.*

**Universitatoj en Eŭropo.** *Granda Britujo* havas 14 universitatojn (1 por 410.000 loĝ.). — *Svisujo* 7 (1 por 475.000 loĝ.). — *Francujo* 5 (kun 75 fakultatoj, 1 fakultato por 520.000 loĝ.). — *Portugalujo* 5 fakult. (1 por 680.000 loĝ.). — *Svedujo* 2 univ. (1 por 1,030.000 loĝ.). — *Nederlando* 4 (1 por 1,290.000 loĝ.). — *Italujo* 21 (1 por 1,550.000 loĝ.). — *Hispanujo* 9 (1 por 1,660.000 loĝ.). — *Belgujo* kun 1,720.000 loĝ. havas nur 1 univ., simile *Norvegujo* (por 2,240.000 loĝ.). — *Grekujo* 1 (por 2,434.000 loĝ.). — *Danujo* 1 (por 2,605.000 loĝ.). — *Rumanujo* 1 (por 2,950.000 loĝ.). *Bulgarujo* 1 (por 3,750.000 loĝ.). — *Germanujo* havas 22 univ. (1 por 2,750.000 loĝ.). — *Aŭstrio-Hungario* 11 univ. (1 por 4,820.000 loĝ.) kaj *Rusujo* 10 univ. (1 por 11,100.000 loĝ.).

*Ks.*

# Notoj kaj informoj.

## Heřman Alferi,

membro de I. A. I. kaj ĉefa kunlaboranto de I. P. R.

La morto elŝiris el nia juna I. A. I. unu el la plej fervoraj kaj plej agemaj membroj. Por ni, kiuj delonge havis okazon vidi la senĉesan laboradon de nia nelacigebla kolego kaj amiko, estis nekredebla la sciigo, kiu anoncis al ni, ke li mortis la 6-an de aprilo 1909 post nelonga malsanado, estante nur 38-jara . . . . . Estas malfacile prezenti al si homon pli energie kaj pli entuziasme propagandantan ĉiujn ideojn, kiuj rilatas la progreson de la homaro, ol estis Alferi. En lastaj jaroj li dediĉis ĉiujn siajn fortojn al 3 grandaj ideoj: pacifismo, esperantismo kaj libera penso. En tiu senco li verkis ankaŭ sian libron „Mezinárodní výchova a vyučování“ (Internacia edukado kaj instruado) kaj grandegan amason da artikoloj en diversaj gazetoj ĉeĥaj. En la tempo plej lasta li laboris tre energie pri la projekto kiel kunigi por la komuna laborado la du gravajn instituciojn instruistajn, ambaŭ kun la karaktero internacia: *„Bureau International de Federations d' Instituteurs“* kaj *„Internacia Asocio de Instruistoj“*. (Nia venonta kajero alportos lian artikolon pri ĉi tiu temo). — Alferi estis ankaŭ la projektanto de komuna kongreso de ĉeĥaj partianoj de Esperanto, pacifismo kaj libera penso, kies efektiviĝon li, bedaŭrinde, jam ne ĝisvivis. Bonan memoron al vi, nia kara kolego!

*La red.*

**Propono pri la plibonigo de edukado** en instruistaj seminarioj en Bulgarujo. La bulgara registaro eldonas gazeton „Učilišten Prěgled“. Unu el ĝiaj Nroj alportis rimarkindan artikolon

de la redaktoro S. Velev: „Miŝljenje za reformiranje na pedagogiĉeskite uĉiliŝta“ (Pensoj pri la reformo de pedagogiaj seminarioj), en kiu oni interalie postulas: instruistoj akiru la ĝeneralan edukon en la reala gimnazio aŭ pli alta reallernejo; por la speciala eduko de instruistoj estu fonditaj pedagogiaj akademioj; en la pedagogian akademion estu akceptataj nur tiuj, kiuj finis studadon en la reala gimnazio aŭ pli alta reallernejo, gimnazianoj ne estu akceptataj; instrufakoj en la pedagogia akademio estu: historio de filozofio, enkonduko al filozofio, politika ekonomio, filozofio de juro, gepatra lingvo, unu moderna lingvo kaj specialaj pedagogiaj sciencoj. Se la akademio estos en la urbo kun universitato, la akademianoj vizitu la universitatan instruadon senpage. Pedagogiaj akademioj estu apartigitaj de institutoj mezaj kaj pli altaj, por ke oni evitu la malfacilaĵojn, kiuj sekvas la troplenigon de lernejo. Por la ofico de instruisto ne estu akceptataj malbonaj oratoroj. Por ke oni veku intereson por la ofico de instruisto en la lernantoj de mezlernejoj, oni instruu en tiuj lernejoj ankaŭ pri la ĝenerala pedagogio. Por distriktaj inspektoroj estu aranĝita aparta kurso.

*Th.*

**Imbecilaj infanoj en Usono.** La ŝtato Massachusetts havas lernejon por la infanoj imbecilaj* en Waltham kaj kolonion en Templeton. En la kolonion venas lernantoj, kiuj absolvis la lernejon en Waltham, por labori praktike sur vasta kamparo (3 kvadrataj mejloj!). La lernanto estas daŭre okupata en la kolonio, kiu havas ĝis 600 zorgatoj. La ŝtata instituto en Syracuse (N. Y.) estas aranĝita por 500 zorgatoj; al ĝi apartenas la bieno por precipaj malfortuloj kaj aziloj vira en Rome kaj virina en Newark. La propra lernejo konsistas el du gradoj: prepara kaj prova. La plej bona estas la instituto „Elwyn“ en Delavare C (Pensilvanio). Ĝi havas ordinare ĝis 1000 lernantojn, el kiuj por 600 pagas la ŝtato. Tie ĉi estas 3 grupoj: la 1-a egalas al 3 jaroj de lernejo elementara kaj ĝi estas difinita por relative la plej kapablaj infanoj, la 2-a grupo enhavas objektan instruadon, kiu estas kunigita kun laboroj en la ĝardeno, laborejo kaj mastrumejo, la 3-a grupo de la plej malmulte kapablaj infanoj lernas en labora klaso nur profitodonajn laborojn. La instituto havas ankaŭ la preparan klason. Ĉiuj infanoj estas instruataj en „object room“, kiu estas preskaŭ muzeo naturscienca kaj teknologia; al ĝi aliĝas ĝardeno kun laborkampoj. Dum la instruado estas uzata precipe la metodo de Tadd, kiu donas bonan sukceson. La plej juna estas la ŝtata instituto en Polk (Venango Cy) en okcidenta Pensilvanio. Ĝi estas aranĝita ĝis por 800 infanoj, por kiuj estas konstruitaj 50 pavilonoj.

*Promyk.*

**Japana societo** por la studado de infano havis en la pasinta jaro sian unuan kongreson kun multaj partoprenantoj kaj sub la prezido de Dro Motora, prof. de psikologio ĉe la universitato en Tokio. La detala raporto pri la kongreso, verkita de Dro Fudĵikava, estas publikigita en la gazeto „Zeitschrift für Kinderforschung“ (j. XIV, pĝ. 53). Por niaj legantoj ni citas nur tion ĉi: En Japanujo estis fondita antaŭ 20 jaroj la „Societo por la studado de in-

* *Imbecila* = fr. *imbécile*, it. *imbecille*, lat. *animi imbecilli*, angl. *weak-minded, idiotic*, germ. *schwachsinnig*, boh. *slabomyslný*.

fano" (Kyo-iku-ken-kyu-ŝo), kiu nun havas ĉirkaŭ 1000 membrojn ne nur el la regiono de specialistoj, sed estas inter ili ankaŭ kuracistoj, juristoj ktp. La societo eldonas, kiel estis konstatebla, de la j. 1897—8 propran organon (ĉiumonatan) „Dĵi do Kenkyn", kiu estas dediĉita al esplorado pri la infano, precipe en la direkto de pedagogia patologio kaj terapio. Tiu ĉi organo estas redaktata, kun helpo de multaj kunlaborantoj, de prof. Dro Motora, prof. Dro Takaŝima kaj kuracisto Dro Fudĵikava.

*P. R.*

## Nia »telefono«.

Estimata Redaktoro!

Multfoje oni diris kaj skribis, ke nur tiam nia lingvo pli rapide kaj pli intense povos progresi, kiam ĝi estos enirinta en la lernejon. Sed por povi enkonduki ĝin en la lernejojn, oni necese devas havi instruistojn, kiuj scias la lingvon. Bedaŭrinde ŝajnas, ke ĝuste inter la geinstruistoj nia lingvo plej malmulte disvastiĝas.

Kial? Mi ankoraŭ ne scias, sed estas fakto. Kelkefoje oni povas legi en gazetoj esperantistaj, ke tie ĉi aŭ tie la instruado de Esperanto estas akceptita en iu ajn instituto, sed mankas al ni ĝenerala supervido, tiel ke oni ne certe scias, ĉu vere Esperanto multe progresis en tiu direkto.

Por propagandi nian lingvon inter la geinstruistoj, estas necese, ke ni ĉion sciu, kio rilatas la instruistan teritorion. Precipe ni devas scii, ĉu jam multe da geinstruistoj aliĝis al nia unuiĝo, kaj en kiuj landoj kaj en kiom da lernejoj nia lingvo jam estas enkondukita. Kiam la instruistoj diverslandaj, kiuj instruas nian lingvon en la lernejo, bonvolus iom detale sciigi al vi, la rezultaton de ilia instruo, la nombron de la lernantoj kaj la metodon uzitan, tiam ni havus faktojn, kiuj klinigus al nia afero la neesperantajn instruistojn. Nur pri tiaj faktoj ili interesiĝas.

La geinstruistoj formas tre ŝatindan armeon, konsistantan plejparte el junaj geviroj, kaj ĉiujare nova aro aliĝas al tiu armeo. Jam tial estas devego de ĉiu esperantisto, kiu havas rilatojn kun la instruistoj, peni gajni por nia afero tiujn gejunulojn, kiuj estas edukataj por la grava instruista ofico. Ĉar kiu havas pli multe da influo je la infanoj ol la geinstruistoj? La impresema naturo de la infano facile malfermas sin por la instruisto aŭ instruistino.

Ĝi nepre konfidas sin al ili, kredas, plejparte senkondiĉe, iliajn asertojn.

Kiam idealista instruisto transverŝis iom de sia idealismo en la akcepteman animon de la lernanto, ĝi baldaŭ nepre ardas por la nova ideo.

„Donu al mi la infanojn kaj mi havos la tutan mondon" estas ĉie konata diraĵo. Esperantistoj pripensu la signifon de tiu ŝajne simpla sentenco. La nuna infano dekjara estas la viro aŭ virino de post dek jaroj. Se vi hodiaŭ povus enkonduki Esperanton en la lernejojn ĉiulandajn, post dek jaroj la tuta mondo estus venkita. Tial ni devas konvinki la instruistaron, ke Esperanto

ne nur alportas centopecan utilon por ĉiuj penseblaj aferoj, sed precipe estas utila por ĉio, kio rilatas ilian propran oficon. Ilia horizonto per ĝi treege disvatiĝos per la facile akirebla scio de ĉiuj mondpartoj; kaj iam tre certege la laciga studo de la naciaj lingvoj estos limigita kaj parte estos anstataŭita de la studo de tiel facila Esperanto. Utila ĝi fine estas por la elturmentitaj infanoj, kiuj jam devas lerni malfacilan fremdan lingvon antaŭ ol scii la plej necesan konon de la gepatra lingvo, dum grandega procento de tiuj plendindaj estaĵoj neniam estos kapablaj bone uzi la akiritan scion, pro la simpla kaŭzo, ke ili ĝin ne sufiĉe funde ellernis. Geinstruistoj, aliĝu al nia juna, sed grava kuniĝo; ĝi estas necese por atingi la celon. La tuta esperantistaro devas esti konvinkita, ke vi, geinstruistoj, havas la potencon aliigi la tutan situacion, ke vi per via influo je la infanmondo estas gepotenculoj, kiuj faras esperantistojn el la idoj de la plej skeptikaj homoj, kiuj certe estos konvinkataj de iliaj propraj infanoj pri la utilo de nia afero.

Geesperantistoj, verbu la geinstruistojn, kaj ni venkos la mondon. Kolektu kiel eble plej multe da faktoj, per kiuj ni povas pruvi, ke la lernejo jam estas grava parto de la batalkampo.

F a k t o j n ni bezonas, f a k t o j n kaj ree f a k t o j n. Faktoj neniam estas refuteblaj. Kontraŭ faktoj oni ne povas disputi, antaŭ faktoj la plej obstinaj skeptikuloj d e v a s cedi.

Ni ilin kolektu. Kaj certe nia fervora kunfrato Čejka volos fari el ili la plej bonan propagandilon enmetante ilin en la Revuon.

Tiel la Revuo fariĝos por ni batalilejo, el kiu ni ĉiutempe povos preni batalilojn, kaj kiam kelkaj el ili fariĝos malakraj, rustitaj, kurbigitaj aŭ mankhavaj, ĉiam novajn ni trovos en ĝi, ĉar dum la batalado ili fariĝos, ĉiam pli akraj, ĉiam pli perfektaj.

Nu, samideanoj, obstine antaŭen al la venko!

Prof. *M. J. Wessel*, Rotterdam (Nederlando).

## Esperanto en la lernejo.*

Oni scias, ke Lille estas fokuso de propagando, sed oni ne scias, kiel tio fariĝis.

Antaŭ kvin jaroj, kvazaŭ okaze, mi sendis al mia inspektoro, s-o M i n e t, noton pri la taŭgeco de Esperanto por konigi ĉefverkojn. La noto estis apogita per fakto: dank' al Esperanto pola kolego ĵus malkovris „La Fontaine!" . . .

Surprizo! Sekvantan monaton mi trovis mian raporteton en „Le Nord Pédagogique". Fide mi daŭrigis informi la estron; fidele li publikigis la informojn.

Dume, mi senbrue instruis Esperanton al miaj knaboj per eksterklasa kurso.

Iam venis inspektoro. Pro kutimo lernantoj ellasis esperantajn vortetojn. Tio plaĉis al la vizitanto. Li gratulis la edukatojn, pravigis la edukiston kaj favore raportis al akademia inspektoro.

---

* El marta (1909) kajero de la gazeto »*Franca Esperantisto*«.

Dum la jaro 1906 laŭ peto de s-o Minet mi publikigis priesperantan kurson en „Le Nord Pédagogique“. La kurso rekomenciĝas ĉiujare. Ankaŭ kaj ankoraŭ daŭras artikoloj, en kiuj mi ofte insistas pri la pedagogia valoro de Esperanto.

Iom post iom fariĝis pli plena kaj praktika mia instruado. Baldaŭ mi sendis al mia realigema inspektoro eksterlandajn poŝtkartojn ricevitajn de miaj lernantoj. Fine li pensis: kio estas farata ĉe la lernejo „Montesquieu“, tio estas farebla en mia tuta distrikto.

Dum marto 1907, post konsento kun sia estro, s-o Minet sciigis al sia personaro, ke post aŭgust-septembra libertempo oni devige instruos Esperanton ĉe la superaj kursoj de la elementaraj lernejoj kaj ankaŭ ĉe la komercaj sekcioj de la supralernejoj. Ĉiu aranĝis sian tempuzadon por doni ĉiusemajne du tridekminutajn lecionojn, kaj de l' monato oktobro 1907 ĉirkaŭ 1200 gelernantoj konstante lernas Esperanton en niaj lernejoj.

Por sin prepari al la nova instruado, geinstruistoj laŭvole — de aprilo ĝis julio — sekvis specialan kurson.

Por kroni tiun organizadon, oni starigis ĉiujaran ekzamenon kun diplomo. Unua ekzameno okazis dum julio 1908. Kvarcent geknaboj plenumis la provojn (temon, tradukon, legadon klarigatan). Tricent-tridek-naŭ ricevis diplomon solene disdonitan kun la premioj.

Vi scias, kiom babilema estas la gazetaro esperanta. La Lille'a organizado rapide diskoniĝis. El multaj landoj mi ricevis kaj ankoraŭ ricevas detalpetojn, ĉiam kompleze respondatajn.

Jen estas kiel Lille fariĝis fokuso.

Mi rakontas tion ne por fieriĝi, ĉar mi estas pli ŝancema ol lerta, sed por instigi kolegaron kaj estraron. Modesta instruisto povas nur provi kaj pruvi; aliaj decidos. Mi provis. La semo falis sur bonan teron. Ne semante, kiel koni teron? Kiel plibonigi, se oni ne uzas kulturadon?

Ni ŝajnas senpovaj. Tamen nia rolo estas potenca: amigi sube, ŝatigi supre. Do ni, instruistoj, komencu! Ni montru per faktoj, ke Esperanto estas ilo de pedagogia kaj sociala progreso. Respondaj estroj senpruvaj ŝanceliĝas, atendas kaj ne decidas.

Konstante mi raportos tie ĉi pri tutmonda lerneja agado. Sed ne timu, mi plu ne donos konsilojn.

*F. Durieux*,
direktoro de la »Montesquieu«-lernejo,
71, rue de Bouvines, Lille (Francujo).

**Esperanto en aŭstriaj lernejoj.** Moravio, la patrujo de la tutmonde konata pedagogo J. A. Comenius, donas bonan ekzemplon al pli altaj lernejoj: gimnazioj, reallernejoj, komercaj lernejoj ktp. — La plej alta ofico lerneja en nia lando permesis oficiale aranĝi 2 esperantajn kursojn por lernantoj de la ĉeĥaj gimnazio kaj reallernejo en la urbo Kroměříž (Kremsier) kaj simile ankaŭ specialan kurson por lernantoj de ĉeĥaj gimnazio kaj reallernejo en Mor. Ostrava (Mähr. Ostrau), en kiu kurso partoprenas kun la permeso de siaj estroj ankaŭ lernantoj de komerca lernejo el Mar. Hory (Marienberg) kaj lernantoj de instruista seminario el Pol. Ostrava (Pol. Ostrau). En ĉiuj suprenomitaj kursoj instruas nia bone konata instruanto de Esperanto kaj kolego J. Krumpholc. — En Wien estis aranĝitaj 2 gravaj kursoj (ankaŭ kun la permeso

de altaj oficoj lernejaj): en la germana „Neue Wiener Handels-Akademie“ (instruis la komitatano de I. A. I. prof. Otto Simon) kaj en la regna „Export-Akademie“ (instruis s-o F. Schonka).

*Th. Čejka.*

**Por la propagando kaj statistiko.** La redakcio de I. P. R. bezonas sciiĝi plej baldaŭ: en kiuj lernejoj kaj edukejoj oni instruas Esperanton al lernantoj. Ju pli multaj kaj fruaj estos la sciigoj pri tiu ĉi afero, des pli bone por la propagando. Oni sciigadu nin pri tio ĉi regule ankaŭ estonte — do konstante pri novaj kaj novaj sukcesoj de Esperanto!

## El la letero.

. . . Mi pensas, ke multe, tre multe utilus al nia afero, se la instruistoj pasigus siajn libertempojn interŝanĝe ĉe siaj fremdlandaj kolegoj. Mi klarigos mian ideon pli precize: Ekzempe mi dezirus pasigi mian someran libertempon (aŭ ĝian parton) en Danujo. Vi scias, ke instruistoj nenie estas riĉuloj. Ankaŭ mi ne estas riĉulo, sed nur simpla salajrulo. Kiel do aranĝi mian libertempan ekskurson al Danujo? Mi prezentas al mi ĉi tion jene: Iu dana kolego, kiu volas konatiĝi kun mia lando kaj nacio, povas loĝi kaj nutriĝi ĉe mi dum la tuta libertempo (aŭ ĝia parto) *tute senpage*, kondiĉe, ke mi povos fari la samon ĉe li en la venonta jaro. Se la dana kolego loĝos ĉe mi, li tute ne bezonos scii aŭ kompreni la ĉeĥan lingvon kaj tamen li ricevos en mia lando ĉiujn informojn, kiujn li bezonos aŭ deziros ricevi. Kiel tio ĉi okazos? Mi estos lia konstanta kaj ĉiea akompananto kaj la plej volonta kaj servema klariganto en ĉiuj aferoj, kiuj iel povas lin interesi. Se li deziros vidi kaj studi la manieron de vivado de niaj vilaĝanoj, ni faros oftajn vizitojn en diversaj vilaĝoj (se ni mem ne loĝos en iu vilaĝo), se li havos intereson por la vivado en niaj urboj, ni ofte vizitos urbon (se ni ne loĝos en urbo), se li deziros vidi aranĝon de niaj lernejoj, diversaj institutoj edukadaj aŭ aliaj, fabrikoj ktp., ni vizitados diversgradajn lernejojn, institutojn, fabrikojn ktp. — Tiel povos pasigi ĉe mi la dana kolego 2—3 semajnojn aŭ 1—2 monatojn — laŭ sia libera tempo kaj deziro. — Kaj kiom da mono li bezonos por tiu fremdlanda ekskurso? Tiom, kiom estas bezone por veturi al mi kaj poste de mi. Se vizitos min dana kolego el ĉirkaŭaĵo de Kopenhago, li ne bezonos por tiu celo pli multe ol 60—70 kronojn (laŭ tio, ĉu li veturos al mi direkte per ordinara aŭ rapida vagonaro). — Kiu povas tiel malkare vojaĝi kaj pasigi *2 monatojn* en *fremda* lando? Krom fratigitaj kaj ĉiam servopretaj esperantistoj eble neniu! — Tiel mi povos pasigi ĉiun duan jaron (libertempon) en alia lando. — Kiom ni instruistoj povus profiti el tiamaniera vojaĝado por nia scio kaj profesio? Kaj la profito en efektiveco ne estos gajnita sole por ni mem, sed ankaŭ por ĉiuj niaj samlandanoj. Ĉar, se mi loĝos en Danujo 1—2 monatojn, ĉu ne interesos min vidi, krom aferoj lernejaj, ankaŭ labormanieron de tieaj kamparanoj, ĉu mi ne deziros konatiĝi kun la metodo de iliaj laboroj ĉu sur la kampo ĉu en domoj, laktejoj, kokin-edukejoj, bovinejoj kaj aliaj „ejoj“? Mia kolego-akompananto klarigos al mi ĉion necesan

per helpo de siaj samnacianoj, mi faros por mi skribajn notojn pri ĉio, kio ŝajnos al mi notinda kaj poste uzebla. Kiam mi revenos hejmen, mi povos fari multajn instruajn kaj informajn paroladojn por miaj kunloĝantoj aŭ verki artikolojn por la publiko pli vasta. – Kaj ĉu per tia agado mi nenion faros ankaŭ por Esperanto? Mi estas certa, ke tiel mi senarmigos ĉiun dubulon aŭ kontraŭlon de Esperanto ne per vortoj, sed per nerefuteblaj faktoj, ĉar ĉiu povos preskaŭ palpi la utilojn kaj profitojn, kiujn alportas al ni nun jam solvita problemo de helpa lingvo internacia. – Se kelkaj el viaj kolegoj aŭ koleginoj dezirus pasigi sian libertempon jam tiu ĉi jare en mia lando, mi estas preta tuj entrepreni ĉion por plenumi ilian deziron. Mi anoncos en nia instruista centra organo, ke tiuj kolegoj-esperantistoj, kiuj deziras loĝi la proksiman jaron en Danujo (tute senpage!!), sendu al mi siajn adresojn ktp., ktp. — Ĉu vi volas fari simile ankaŭ en viaj gazetoj? . . .

*Th. Čejka.*

Rimarko de la redakcio. Gekolegoj, kiuj volus akcepti dum la ĉefa libertempo la viziton (kiomtagan?) de siaj fremdaj kolegoj aŭ koleginoj (por la reciproka vizito en la venonta jaro), sciigu senprokraste siajn adresojn kaj la tempon de la ĉefa libertempo al la redakcio de I. P. R.

## Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.).

**Novaj membroj** de la I. A I., kiuj aliĝis de la 10. XI' 1908 ĝis la 20. V. 1909 kaj pagis (escepte: ? Sm) la kotizaĵon 1 Sm por unu jaro (1908–1909): 86. Menšík, Mor., 87. Šmejc, Boh., 88. Lustyk, Boh., 89. Halamasek, Malsupra Aŭstrio, 90. Peterka, Boh., 91. prof. Lisický, Mor., 92. prof. Kolkop, Mor., 93. Moclík, Mor., 94. Coufal, Mor., 95. s-ino Noget, Fr., 96. Frixon, Fr., 97. Roy, Fr., 98. Schmied, Mor., 99. O' Connor, Angl., 100. Whitaker, Angl., 101. Holmes, Angl., 102. Svačina, Boh., 103. Farnik, Boh., 104. Macan, Boh., 105. prof. Fierlinger Mor. (2 Sm), 106. Svoboda, Boh., 107. Fučík, Boh., 108. prof. Wirth, Fr., 109. Heinl, Boh., 110. frl. Jandová, Boh., 111. Šmejkal, Boh., 112. Volák, Boh., 113. Phillimore, Angl., 114. Neužil, Mor., 115. Elenius, Finnlando (? Sm), 116. Gruza, Pol.-Rus., 117. Boulé, Fr., 118. Lacoudre, Fr., 119. Marcín, Boh., 120. Roselló Ordinas, Malorca-Hispan. 121. Verbanck, Belg., 122. Baudet, Fr., 123. frl. Hubert, Fr., 124. Vyčítal, Boh. (? Sm), 125. Kudrna, Boh., 126. Ábrai, Hung. (? Sm), 127. prof. Michels, Hung. (? Sm), 128. prof. Kleitsch, Hung. (? Sm.), 129. M. Timuŝ, Rumanujo, 130. Butler, Angl., 131. Köhler, Germ., 132. frl. Leguerne, Fr., 133. Albagés, Hisp., (? Sm), 134. Navés, Hisp. (? Sm), 135. Delclós, Hisp. (? Sm), 136. Jou. Hisp. (? Sm), 137. Montúa, Hisp. (? Sm), 138. Lespagnol, Fr., 139. Pátek, Boh., 140. Dvořák, Boh., 141. Vatan, Fr., 142. Macho, Malsupra Aŭstrio, 143. Zlámal, Mor., 144. Brzák, Mor., 145. Košťál, Boh., 146. Koschier, Karintio-Aŭstrio, 147. Pechatý, Boh., 148. Vincent, Fr., 149. Dro Krajewski, Galicio, 150. Hanek, Boh., 151. Risberg, Sved., 152. Široký, Boh. (? Sm), 153. L. Procházka, Mor., 154. frl. Munro, Skotl., 155. Głuchowski, Pol.-Rus.,

156. prof. Lowell, Usono, 157. Scarselli, Italujo, 158. frl. Castel, Fr., 159. Šlejferka, Boh., 160. Houra, Boh., 161. Zadák, Boh., 162. s-ino Kozlova, Rus. (1½ Sm), 163. Šubanjevič, Rus. (1½ Sm), 164. frl. Tesařová, Boh., 165. Henych, Boh., 166. s-ino Jenckel, Germ., 167. prof. Eggleton, Germ., 168. frl. Cather, Malta (1½ Sm), 169. N. Timuŝ, Ruman. (? Sm), 170. Khun, Boh. (1½ Sm), 171. prof. Török, Hung., 172. Riegel, Boh. (1½ Sm), 173. Schulz, Hung. (1½ Sm), 174. Stroele, Svis., 175. K. Müller, Hung, 176. Zoffmann, Dan., 177. Wessel, Nederl., 178. frl. Křepelková. Mor. (1½ Sm), 179. frl. Colleatte, Fr., 180. François, Fr., 181. prof. Queste, Fr., 182. Ponnier, Fr., 183. Marchand, Fr., 184. Mills, Angl., 185. frl. Lodge, Angl., 186. Fenton, Angl., 187. frl. Hoyle, Angl., 188. frl. Metcalfe, Angl., 189. frl. Reiĥenbaĥ, Rus., 190. s-ino Lebouché, Fr., 191. prof. Gérault, Fr., 192. Cox, Angl., 193. frl. Skeen, Angl., 194. frl. Hamand, Usono (½ Sm), 195. Buret, Alĝerio, 196. frl. Faleur, Fr., 197. insp. Bonnehon, Fr., 198. frl. Delerive, Fr., 199. M. Tarańko, Galicio, 200. Moesgaard, Dan. (2 Sm.), 201. Charvát, Boh., 202. Kellenberger, Hung., 203. Dro Lewy, Germ. (2 Sm), 204. Thiel, Germ., 205. Piątek, Galicio, 206. Martinol, Fr, 207. frl. Schröcková, Boh., 208. frl. Parducci, Ital., 209. prof. Piens, Fr., 210. frl. Sombret, Fr., 211. Popov, Bulg., 212. Willumsen, Norveg., 213. Trigo, Hisp., 214. Cruz, Hisp., 215. Bourniche, Fr., 216. prof. Grahl, Šved., 217. frl. Vejtasová, Boh., 218. Pisiewicz, Galicio, 219. s-ino Hornbroock, Usono, 220. Šembera, Mor., 221. Holý, Boh., 222. Polle, Fr., 223. Hurtado, Hisp, 224. frl. Haller, Dan., 225. Bougeois, Fr., 226. Melzer, Germ., 227. Verburg, Nederl., 228. frl, Barat, Fr., 229. Delahaye, Fr., 230. Elling, Dan., 231. Vačkář, Boh., 232. Kiuichi Nohara, Japan., 233. Jacobs, Belg., 234. Beregavskij, Azia Rus., 235. frl. Kunovská. Mor., 236. Laustsen, Dan., 237. Šilha, Mor., 238. frl. Bye, Norveg., 239. frl. Finholdt, Norveg., 240. Přikryl, Mor., 241. Hesselager, Dan., 242. Stránský, Mor., 243. Steckenburg, Nederl., 244. Brančík, Mor., 245. prof. Sarmento, Portug., 246. Traeger, Boh., 247. Vyhnánek, Mor. 248. Randall, Usono, 249. frl. Jones, Angl., 250. frl. Spink, Angl., 251. frl. Geddes, Angl., 252. frl. Fielding, Angl., 253. frl. Bottomley, Angl., 254. frl. Cotton, Angl., 255. Hirst, Angl., 256. frl. Dunnill, Angl., 257. frl. Wood, Angl., 258. frl. Holdsworth, Angl., 259. frl. Robinson, Angl., 260. frl. Mudie, Angl., 261. Whitley, Angl., 262. Hudson, Angl., 263. Pearson, Angl. 264. Shanks, Angl.

**Membroj de I. A. I. laŭ landoj**: Alĝerio 1, Aŭstrio-Hungario 84 (Aŭstrio Malsupra 4, Bohemujo 40, Galicio 5, Karintio 1, Moravio 26), Belgujo 3, Brazilio 1, Britujo 43 (Anglujo 40, Malto 1, Skotlando 2), Danujo 6, Francujo 59, Germanujo 16, Hispanujo 9, Italujo 4, Japanujo 1, Nederlando 4, Norvegujo 4, Portugalujo 1, Rumanujo 3, Rusujo 12 (Finnlando 1, Polujo 4, R. Azia 2, R Eŭropa 5), Serbujo 1, Svedujo 4, Svisujo 1, Tunisio 1, Usono 5.

**Monon sendu al la kasisto** aŭ per poŝta mandato aŭ per 10 poŝtaj „respond-kuponoj", kiuj estas riceveblaj ĉe ĉiuj poŝtoficejoj (ĉiu kupono devas esti stampita per poŝta stampilo, ĉar alie ĝi estas por ni senvalora). Alia maniero de pagado estas malprofita por la kaso de I. A. I.

*Th. Čejka,* kasisto.

# Koresponda Fako de I. A. I.

*Interŝanĝo de poŝtkartoj kun fotografaĵoj de lernantoj kaj instruistoj.*

Ĉar la junuloj korespondantaj en Esperanto ofte deziras posedi portretojn de siaj malproksimaj amikoj, mi proponas al la anoj de I. A. I. la senkvantan aranĝon:

1. I. A. I. entreprenos eldonadon de presitaj poŝtkartoj, kiuj enhavos fotografaĵojn de: lernantoj-esperantistoj kun iliaj profesoroj, lernejaj domoj, klasoj, kabinetoj, gimnastikaj aranĝoj, ludoj, muzikistaroj ktp. sub la komuna titolo: *„Internacia Lerneja Albumo de I. A. I.“*, kies la Nroj 1., 2. kaj 3. jam aperis kaj estas aldonitaj al tiu ĉi numero de I. P. R.

2. Ĉiu ano de I. A. I., deziranta eldoni similan poŝtkarton, devas sendi al la kasisto de I. A. I. 10 Sm kun la originala fotografaĵo kopiota. Li ricevos 1000 ekzemplerojn; sekve, se en la grupo partoprenos 20 personoj, ĉiu pagos nur 50 sd., kaj ricevos 50 poŝtkartojn, t. e. nur po 1 sd ĉiu ekzemplero; tiamaniere li havos treege malkaran poŝtkarton por sia korespondado.

3. La I. A. I. konservos la kliŝaĵojn kaj presigos por sia propra bezono pluajn ekzemplerojn.

4. La redakcio de I. P. R. aldonos senpage al la nomita gazeto po unu ekzemplero de ĉiu eldonita poŝtkarto. La resto estos vendata por la profito de I. A. I.

5. De tempo al tempo la I. A. I. per helpo de la konservitaj kliŝaĵoj eldonos lernejajn albumojn laŭ apartaj landoj, vendotaj por la profito de I. A. I.

6. La mendintoj, dezirantaj ricevi pli ol 1000 ekzemplerojn, pagas por ĉiu plua milo po 5 Sm.

7. Estus dezirinde, ke la originalaj fotografaĵoj estu en granda formato, ekzemple 24 × 30. Ili restos en la oficejo de I. A. I. kaj estos ĉiam elmetataj dum esperantistaj kongresoj en ekspozicioj.

Ĉar la elspezoj por ĉiu partoprenanto en la ĵus nomitaj opaj fotografaĵoj estas tre malgrandaj, kaj ilia signifo por nia propagando sendube grandega, mi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj havas junajn lernantojn, aliĝi al mia propono. Anstataŭ aĉetadi kaj dissendadi sensignifajn ilustritajn poŝtkartojn, ili havos tre malkarajn kaj tre utilajn por nia afero propagandilojn, kiuj kostos al ili multe malpli ol la ordinaraj kartoj.

Estus ankaŭ tre utile eldoni poŝtkartojn kun fotografaĵoj de ĉiu esperantista grupo laŭ montritaj de mi principoj, kaj la aranĝon povus preni sur sin la Universala Esperantista Asocio por ĉiuj grupoj, kiel tion faros la Internacia Asocio de Instruistoj por la lernantoj kaj instruistoj.*

*Romano Frenkel.*

* La esperantistaj gazetoj estas petataj transpresi mian artikolon.

# Adresaro por instruistoj.

Klarigo de signoj: **L** = lernejo, **I** = instruas, **NL** = kun kolegoj el nacio aŭ lando . . ., **K** = korespondas pri . . ., **D** = donas sciigon pri . . , **Dez** = speciala deziro. Unu anonco por la membroj de I. A. I. senpage. Nemembroj alsendu 5 respond-kuponojn (por 5 linioj).

1. **Svedujo**. MALMÖ. – *Jul. Hammarlund* (svedo). **L**: Popollernejo. **NL**: Ĉiuj. **K**: Pri kiu ajn fako pedagogia. **D**: Informojn pri Svedujo kaj ĝia popolinstruado. **Dez**: Pasigi libertempon en bela regiono en fremda lando.

2. **Rusujo-Estlando.** REVEL, str. Nikolskaja, 9. – *F-ino Marta Reiĥenbaĥ* (estino). **L**: Elementara lernejo por knabinoj. **NL**: Kun gekolegoj el ĉiuj nacioj, precipe slavoj kaj finnoj. **K**: Pri eksperimenta pedagogio kaj novaj vojoj en pedagogio. **D**: Sciigojn pri stato de lernejoj kaj instruistoj en Estlando.

3. **Germanujo**. HAUBINDA, poŝto STREUFDORF (Sachsen-Meiningen). – *Prof. J. W. Eggleton* (anglo). **L**: Privata lernejo, havanta instruprogramon de publika reallernejo (9 klasoj). **I**: Anglan lingvon. **NL**: Kun gekolegoj, posedantaj ĝisfunde, krom Esperanto, unu el la jenaj lingvoj: franca, germana, angla. **K**: Pri lingvaj demandoj, ekz.: etimologio, gramatiko, fonetiko, literaturo, literatura stilo, tradukarto ktp. (precipe en rilato al Esperanto). **D**: Lecionojn (per korespondado) pri lingvoj angla, franca, germana; tradukojn el tiuj lingvoj Esperanten aŭ male („vice versa“). **Dez**: Helpon por traduki Esperanten plej malfacilajn nacilingvajn idiotismojn en celo verki praktikan esperantan „Frazlibron“, laŭ sistemo tute nova.

4. **Aŭstrio-Bohemujo**. BZOVÁ, poŝto ŽEBRÁK. – *Bohaboj Zadák* (ĉeĥo). **L**: Publika lernejo elementara. **NL**: Kun gekolegoj el Galicio, Kroatujo, Svedujo, Francujo, Svisujo. **K**: Pri vojaĝado, lerneja sistemo, etnografio. **D**: Tradukojn el ĉeĥaj gazetoj. **Dez**: Pasigi libertempon apud maro. Ricevi tradukojn el pedagogiaj gazetoj svisaj kaj svedaj. Interŝanĝi ilust. poŝtk.

5. **Francujo.** SENS (Yonne). – *Prof. René Deshays* (franco). **L**: Liceo: duagrada instr. publika. **I**: Literaturon (france, latine, greke) en la tria klaso (14-jaruloj), sekcioj A (kun latina lingvo) kaj B (sen latina lingvo). **NL**: Kun kolegoj germanaj, anglaj, precipe usonaj. **K**: Pri la nuna stato de l'studoj en antikvaj lingvoj, pri la profito aŭ neutileco de tiuj studoj. **D**: Plezure mi akceptos hejme vojaĝantajn gekolegojn. **Dez**: Varbi aliĝojn por la societo „Libera Penso“ (jare 1 Sm kun la bulteno).

6. **Portugalujo**. EVORA, R. Jaenne Alves 1, Alemtejo. – *Prof. Luiz Antonio Galvao Moraes Sarmento* (portugalo). **L**: Normala lernejo. **I**: Matematikon kaj natursciencojn. **NL**: Kun hispanoj kaj japanoj. – **K**: Pri aferoj lernejaj. **D**: Helpos al tiu, kiu vizitos mian urbon kaj ne scios lingvon portugalan. **Dez**: Kolektas geografiajn kartojn.

7. **Rumanujo**. ROŜIORJ-ILFOV. – *Miĥaelo Timuŝ* (rumano). **L**: Publika lernejo elementara (5 klasoj). **NL**: Kun gekolegoj

ĉiulandaj. **K**: Pri la vivado kaj movado de instruistaro; pri ĝia agado kaj salajroj. **D**: Utili al tiuj, kiuj deziras verajn informojn pri rumana vivado. Tradukos en rumanan lingvon kion ajn oni deziros. **Dez**: Kolektas vidindaĵojn el tutmondaj landoj, fidelajn kopiaĵojn, fotografaĵojn aŭ artefaritajn pentraĵojn de kostumoj, tipoj, pejzaĝoj ktp.

**8. Finnlando.** SUURSAARI. — *Emil Elenius* (finno). **L**: Popollernejo. **NL**: Kun kolegoj el Turkujo, Grekujo, Italujo, Hispanujo, Portugalujo, Japanujo, Indio. **K**: Pri instruado de religio en lernejo. **D**: Faros tradukojn el finnaj lernolibroj pri tiuj landoj, pri kiuj deziros la demandonto. **Dez**: Interŝanĝi desegnaĵojn faritajn en lernejo de geknaboj 9—13-jaraj.

## Adresaro por gejunuloj.

Ciu el ni scias, ke la korespondado kun fremdaj esperantistoj estas la plej taŭga rimedo por fervorigi novan esperantiston kaj alligi lin firme al Esperanto. Sed ni ankaŭ scias, kiel malagrable efikas je la nova adepto de Esperanto la nericevo de sopirege atendata respondo, la unua respondo de fremdulo! Por eviti ĉiun necertecon, ni aranĝos la aferon jene: Ni publikigos en I. P. R. ne la adresojn de apartaj gejunuloj dezirantaj korespondi, sed la adresojn de iliaj instruistoj aŭ esperantaj instruantoj, kiuj ja plej bone konas ĉiun el siaj lernantoj. Tiu, kiu serĉos korespondanton, skribos la unuan fojon ne rekte al sia korespondonto, kies adreson li ankoraŭ ne scias, sed al lia instruisto, kiu volonte transdonos la peton pri korespondado al unu el siaj lernantoj, kiu povos tuj komenci la regulan korespondadon. Ni esperas, ke tiel ĉiu gejunulo trovos certan respondanton kaj I. P. R. povos publikigi grandegan amason da adresoj kaj tamen ne bezonos dediĉi por tiu celo grandan spacon sur siaj nemultaj paĝoj. — La anoj de I. A. I. estas petataj sendi al ni la adresojn de tiuj personoj, kiuj povas kaj volas esti por gejunuloj „adres-donantoj“, kies tasko estos neniel malfacila, ĉar ili ja tute ne bezonos korespondi kun adres-petantoj. — La enskribo de la adresoj por ĉiu membro de I. A. I. estas senpaga. Nemembroj alsendu 5 respond-kuponojn.

*

**Aŭstrio-Moravio:** Deziras korespondi 10—14-jaraj gelernantoj de elementaraj lernejoj kaj 120 lernantoj de gimnazio kaj reala lernejo (12—17-jaruloj). Skribi al Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Moravio. — 50 lernantoj (11—17-jaraj) de ĉeĥa reala lernejo. Skribi al prof. J. Minks, Kroměříž, Moravio. — **Francujo**: 27 lernantoj 12—13-jaraj dez. koresp. per il. poŝtk. Skribi al F. Durieux, dir. de lernejo „Montesquieu“, Lille (Nord). — **Rusujo Azia** (Siberio): 18 lernantoj de gimnazio (12—17-jaruloj). Skribi al R. Frenkel, inspektoro de gimnazio, Enisejsk, Siberio.

Redaktoro kaj eldonanto Theodor Čejka, Bystřice-Hostýn. — Presejo »Družstvo knihtiskárny«, Hranice, Moravio.

programon, por la ĝenerala kunveno de I. A. I. en Barcelono, sendu ilin baldaŭ al la redakcio de I. P. R.

Ni scias, ke preskaŭ ĉiuj el niaj legantoj atendis tiun ĉi kajeron pli frue . . . Certe multaj eĉ timis, ke nia afero eble jam rompiĝis pro iu danĝera rifo. La plej timemaj ankaŭ skribis al ni pri tio kaj demandis nin pri la kaŭzo de tiel longa silentado. Ni ne povis respondi al ĉiu aparte kaj tial ni devis prokrasti nian respondon ĝis nun. Karaj geamikoj, estu tute trankvilaj, kiel ankaŭ ni estas. Certe ĉiu el vi volonte konfesos, ke la membra kotizaĵo de I. A. I. estas tro malgranda por doni al niaj membroj tuj en la komenco, kiam niaj fortoj estas ankoraŭ negrandaj, organon elirantan ĉiumonate . . . Kelke da kolegoj, konfesinte tion, tuj pagis de si mem pli multe ol estis ilia devo . . . Ni ne volu tuj en la komenco esti tro kuraĝaj kaj eliradi pli ofte ol permesas niaj financaj fortoj. Ni *ne devas* fari ŝuldojn (kiu el ni dezirus ilin poste pagi?), ĉar farante nepageblajn ŝuldojn, ni tre malutilus al nia grava entrepreno. Kio ŝajnas al vi pli prudenta: eldonadi gazeton tuj en la komenco tre ofte kaj en ampleksaj volumoj — ĉu vi scias, kiom kostas la afranko de ĉiu nova kajero, sendata fremdlanden? — aŭ eldonadi ĝin komence ne tiel ofte, sed en volumetoj pli dikaj, kun la enhavo pli riĉa? Kiu agado impresas pli bone tiun, kiu observas nin serioze? Ĉu ni ne atingos pli certe nian celon, se nia organo elirados en la 1-a jaro nur kvarfoje (sed ni ne fiksu la daton, ni sole diru — kvarfoje!), dum la 2-a jaro dumonate kaj nur en la 3-a aŭ 4-a jaro ĉiumonate? Ĉu estas malbona la devizo: »Komence modeste, sed poste ĉiam pli kaj pli kuraĝe«? Se ni deziras labori serioze kaj efektive atingi nian altan celon, ĉu nia laborado ne devas esti reala kaj ne fantazia aŭ utopia? Nia I. A. I. kreskas malrapide, sed kreskas kaj kreskas ĉiutage kaj ĉu tio ĉi ne estas por ni la plej bona kaj la plej kuraĝiga signo? La kaso de I. A. I. ne estas ankoraŭ plenega, sed ĝi tamen enhavas jam tiom da mono, ke ĝi plene sufiĉos por kovri niajn elspezojn dum la unua jaro. Tial ni **ĉiuj laboru** kaj esperu!

**Gazetoj pri I. A. I. kaj I. P. R.** Favorajn artikolojn pri la I. A. I. kaj I. P. R. alportis jenaj gazetoj (esper. gazetojn ni ne citas aparte, ĉar ili preskaŭ ĉiuj raportis pri nia afero): El Clamor del Magisterio, Nro 49 (s-o José Albagés, Hispan., Katal.), Journal des Instituteurs, Nro 41 (s-o Ch. Rossignol, P. Cnudde, Belgujo), Gazeta Kujawska, Nro 152 (s-o B. Głuchowski, Pol. Rusujo), Bulletin de l'Association des anciens élèves de l'Ecole Normale de la Seine (s-o Aufroy, Francujo), Land en Volk, Nro 301 (s-o J. L. Bruijn, Nederlando), L'Émancipation de l'Instituteur, Nro 14 (s-o G. Tétaud, Francujo), Bulletin mensuel de l'Association Amicale des Instituteurs et Institutrices de l'Aisne, Nro 147 (s-o J. Bourniche, Francujo), Svensk Läraretidning, Nro 1412 (s-o Jul. Hammarlund, Svedujo), Montrose Standard and Angus and Mearns Register (s-o J. D. Simpson, Skotlando), Het Schoolblad, Nro 8 (s-o M. J. Wessel, Nederlando), Přehled Revuí, Nro 1, V (J. Krumpholc, Boh.-Moravio), Bulletin mensuel de l'Association Amicale des Ardennes, Nro 36 (s-o P. Benoit, Francujo), Folkeskolen, Nroj 11, 12 (s-o N. Moesgaard, Danujo), Köbstadskolen, Nroj 22, 1 (s-oj P. Zoffman, N. Moesgaard, Danujo). — Ni citas sole tiujn gazetojn, kiujn ni ricevis. — Karaj kolegoj, daŭrigu

tiel ankaŭ estonte kaj kuraĝigu ankaŭ aliajn kolegojn skribi pri la I. A. I. kaj I. P. R. kaj traduki el ĝi por naciaj gazetoj. Tio ĉi estas senpaga kaj bonega reklamo, ĉar ĝi estas efika kaj konvinka!

---

**Grava avizo.** Kiu ankoraŭ ne sendis al ni la plenigitan demandaron (vidu la 4-an paĝon de la kovrilo en la 1-a kajero!) por la »Adresaro de instruistoj kaj profesoroj«, plenigu ĝin afable kaj sendu senprokraste al la redakcio de I. P. R. Tiu adresaro havos por ni specialan signifon!

## Bibliografio.

**August Strindberg**: Fraŭlino Julie (Naturalista tragedio). El sveda lingvo trad. P. Nylén kaj S. E. Krikorz. 75 öre. K. W. Appelbergs Bocktryckeri i Distribution, Uppsala, Svedujo. — **August Strindberg**: Pario (Unu akto). Trad. Birjer Ström. 25 öre. La sama eldonisto. — **H. K. Bouška**: Slovakoj kaj Magiaroj (Kelkaj vortoj pri slovaka suferado en Hungario). Sm 0·21. V. Riegel, Praha 1687-II, Bohemujo. — **J. Arbes**: Rakontoj. El ĉeĥa lingvo trad. J. Grňa. Fr. 1·60. Ferd. Boháček, libristo, Jevíčko, Moravio. — **Santiago Rusiñol**: La Patrino (Dramo en 4 aktoj). El hispana lingvo trad. Alfonso Sabadell. Prezo? Feliu & Susanna, Barcelona, Ronda San Pedro, Nro 36. — **R. Deshays**: Popola Frazlibro en 30 lecionoj (Gramatike kaj sence laŭgradaj). Fr. 0·60. Librairie de l'Esperanto, Paris, 15, rue Montmartre. — **Wladyslaw Reymont**: En fumejo de l'opio (Novelo). El pola lingvo trad. Dro Kazimierz Bein (Kabe). Sd. 20. »Pola Esperantisto«, Warszawa, Marszalkowska 143, Rusujo. — **E. Stark** kaj **Fr. Rockmann**: Internacia Legolibro I-a parto. Mk 1·20. Fr. Rockmann, Magdeburg, Buckauerstr. 14, Germanujo. — **Adolf Mach**: Nebe a země. Astronomie pro každého, zvláště pro stud. všelikých škol. K 3·60. Höfer a Klouček, Praha. — Prof. **A. Dombrowski**: Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj (Artikolaro kaj leteraro). Prezo? A. Dombrowski, red. de »Draugia«, Kovno, Rusujo. — **Esperantista Poŝkalendaro** 1909. Mk 0·80. Esper. Verlag Möller & Borel, Berlin S. W., Lindenstr. 18/19, Germanujo (Enhavas, bedaŭrinde, tre multajn erarojn, ne *pres*erarojn, en la adresaro!!). — **J. Borel**: Legolibreto. Sm 0·10 kaj **F. Skeel-Giörling**: Fabeloj de Andersen. Sm 0·10. Esper. Verlag Möller & Borel. — **Esperanto** und seine Feinde. Einige Worte zur Abwehr. Mk 0·20. Esperanto-Gesellschaft, Berlin, Bernburgerstr. 18, Germ. — **Alberto Gómez-Cruz** (jr): Rudimentos de Esperanto. Prezo? Okcidenta esperantista societo, Guadalajara, Jal., Meksiko. — **C. A. Laisant**: La Parlamentisma Iluzio. Fr. 0·15. Internacia Asocio »Paco Libereco«, Paris, 49, rue de Bretagne. — **Bernard Long**: Is Esperanto worth learning? Sh 0·1. Miggie & Coy., Publishers, Rothesay, Skotlando. — **T. E. K. A.-Jarlibro 1909**, I-a vol., eldonita de la »Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio«. Sm 0·4. H. F. Adolf Thalwitzer, Kötzschenbroda-Dresden, Germ. — **Biblioteko Infana**: Nro 1. Ruĝa ĉapeto. Sm 0·10. Nro 2. Kato en botoj. Sm 0·10. Eldonas »Societo Esperantista Kaŭkaza«, Tiflis, Rusujo. — **F. A. Šídlo**: Vzorce a tabulky na měření ploch i těles a na sestavování úloh. 1 K. F. Šídlo, Bystřice-Hostýn, Moravio.

UNIWERSYTET KUL